


# EL POPOLA ĈINIO

9  
1977

中國新道





Prezidanto Maŭ Parolas al Ruĝarmeanoj  
pri Disciplino. (Olepentraĵo)











Konduku la Grandan Proletan Kulturano Revolucion ĝis la Fino! (Olepentraĵo)



Revizito al Gینگang-monto (Gravurajo)




Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

## Enhavo

### KOVRILO:

- P. 1. La Memorhalo de Prezidanto Maŭ
- P. 4. Alta monto kaj pinoj



|  |        |
|--|--------|
| Finkonstruo de la Memorhalo de Prezidanto Maŭ . . .                  | 2      |
| Vojaĝo de la loko de la Aŭtuna Leviĝo ĝis Gingsangmontaro . . . . .  | 7      |
| En malfacilaj tagoj . . . . .  | 11     |
| Sekvi Ĉefkomandanton Ĝu De . . . . .                                 | 13     |
| Du junuloj brave batalantaj kontraŭ la “kvarpersona bando” . . . . . | 19     |
| Ĉuhiong hodiaŭ . . . . .   | 23     |
| Mastroj de Daking-olekampo . . . . .                                 | 25     |
| Savado sur maro . . . . .  | 29     |
| Maljuna ĉinmedicina kuracisto Ĝaŭ Bingnan . . . . .                  | 32     |
| TEATRAĴOJ KAJ FILMOJ: La dramo “La Leviĝanta Suno” . . . . .         | 35     |
| Luktarto, ŝatata sporto de infanoj . . . . .                         | 38     |
| POR AMIKECO: Nova ŝoseo . . . . .                                    | 39     |
| TRA ĈINIO: “Subteraj arbaroj” . . . . .                              | 41     |
| HISTORIAJ OBJEKTOJ: La fontakvujo de Tangbianvilaĝo . . . . .        | 42     |
| KURANTAJ AFEROJ . . . . .  | 18, 44 |

# Finkonstruo de la Memorhalo

**S**UR Tian-anmen-placo, sude de la Monumento de Popolaj Herooj majeste staras kvadrata konstruaĵo kun alteco de 33 metroj. Ĝi estas la Memorhalo de Prezidanto Maŭ lastatempe finkonstruita, kiu manifestas la koran deziron de la diversnacieca popolo de Ĉinio.

En oktobro de 1976, la Centra Komitato de KPĈ estrata de Prezidanto Hua Guofeng decidis konstrui la Memorhalon de Prezidanto Maŭ en la centro de Tian-anmen-placo. Laŭ tiu decido, en la halo lokiĝos la kristala ĉerko kun la korpo de Prezidanto Maŭ, por ke popolamasoj de generacio al generacio povu esprimi sian respekton al la korpo de Prezidanto Maŭ, karmemori lian grandan kontribuon, ricevi forton de tio por konduki ĝisfine la proletan revolucion aferon komencitan de li. De la 24-a de novembro de 1976, kiam Prezidanto Hua ŝovelis teron ĉirkaŭ la angulŝtonon, ĝis nun pasis nur duonjaro, kaj la granda konstruo jam estas venke plenumita.

La totala konstrua areo de la halo estas pli ol 26,000 kvadrataj metroj. La halo staras sur duetaĝa teraso kun fundamentaj muroj el ruĝaj marmoroj ĉirkaŭata de balustradoj el blankmarmoraj tabuloj ornamitaj per desegno de ĉiam-verda rodeo (*Rohdea japonica*). La ruĝa kaj blanka ŝtonmasonaĵoj simbolas, ke la ruĝa ŝtato fondita de Prezidanto Maŭ firme staros kiel roko kaj neniam kadukos. La muroj de la halo estas tegitaj per helflavaj granitaj platoj. La formo kaj koloroj de la tuta konstruaĵo prezentas intensan nacian stilon kaj la halo formas kune kun la aliaj konstruaĵoj sur Tian-anmen-placo unu harmonian tuton.


La halo estas ĉirkaŭata de larĝa bendo de verdajoj, inter kiuj troviĝas mandarinarboj el Hunan, sakuroj el Taivan, drakaj cipresoj kaj abioj el Guangdong, granatarboj el Ŝenhi, kamelioj el Junnan, rododendroj el Siĉuan, neĝpinoj (*Cedrus deodora*) el Kingdaŭ, olepinoj (*Pinus tabulaeformis*) el Hebej kaj pinoj el Jan-an. Popolanoj

de diversaj lokoj alsendis famajn kaj belajn arbojn kaj florplantojn, kiuj formis gigantan florkronon ĉirkaŭ la memorhalo prezentatan al Prezidanto Maŭ.

## KOMUNA DEZIRO

La konstruado de la Memorhalo de Prezidanto Maŭ altiris al si prizorgon de la diversnaciecaj popolanoj de la tuta lando tuj je la komenco. Multaj leteroj kaj telegramoj plenaj de profunda sento flugis al Pekino por esprimi koran deziron de popolanoj kontribui forton al la granda konstrua objekto.

En iu tago, la konstrua komandejo de la halo ricevis el la poŝto pakajon. Ĝin malvolvinte





# de PREZIDANTO MAŬ


oni trovis delikatan lignan keston envolvitan de ruĝa tuko, en kiu troviĝis 12 belaj ŝtonetoj kaj letero, kiu diris: "Informiĝinte pri la ekkonstruo de la Memorhalo de Prezidanto Maŭ, ni batalantoj gardantaj ĉe la fronto de la Flava Maro tre emociiĝis kaj decidis sendi al vi ŝtonetojn de tiu ĉi insulo kaj petas, ke vi metu ilin en la ĉirkaŭaĵon de la Memorhalo de Prezidanto Maŭ. La 12 ŝtonetoj simbolas, ke ni 12 batalantoj tage kaj nokte gardostaras por Prezidanto Maŭ, kaj samtempe esprimas nian decidon defendi per niaj sango kaj vivo sanktan teritorion de la patrolando."

Multaj plej bonaj konstruaj materialoj kaj ekipaĵoj estas kolektitaj kaj elfaritaj en diversaj

lokoj de nia lando kaj senĉese transportitaj al la konstruejo. La konstrua komandejo ricevis fortikajn kaj belajn ruĝajn granitopecojn kolektitajn de hanaj, tibetanaĵoj kaj ji-aj popolanoj de Siĉuan-provinco sur rokmuroj apud Dadu-rivero; grandan pecon de blanka jado kun pezo de 106 kg. alsenditan de ujugura popolo de Hingiang; trunkojn de maljunaj kamforarboj hakitaj de mjaŭ-aj kaj dung-aj popolanoj de Gujĝoŭ; kaj ankaŭ altpremajn plastajn tubojn, maŝinon por rektigi ferstangetojn kaj eĉ teron kaj akvon alsenditajn de popolanoj de Tiangin, Hangĝoŭ, Tangŝan kaj Jan-an.

La konstrua komandejo zorge traktis la memorajojn, konstruan materialon kaj ekipaĵojn

*La Memorhalo de Prezidanto Maŭ en nokto*



esprimantajn profundan amon de la diversnaciecaj popolanoj de la tuta lando kaj uzis ilin en konstruado de la Memorhalo.

Post la komenco de la konstruado, miloj kaj miloj da volontuloj alterne fluadis tage kaj nokte al la bolanta konstruejo. Inter ili troviĝis veteranaj soldatoj de la Ruĝa Armeo spertintaj la Longan Marŝon sub la gvido de Prezidatno Maŭ; antaŭaj armeanoj de la Okavoja Armeo partoprenintaj en la Kontraŭjapana Rezistmilito; gvidantoj de la ministerioj kaj la municipo Pekino; famaj batalaj herooj kaj laboraj modeloj; reprezentantoj ĉeestintaj la Tutlandajn Konferencojn pri Lerno de Daĝaj kaj Daking; blankharaj maljunuloj kaj naivaj infanoj. Ili rigardis elfoson de unu plenŝovelilo da tero kaj transporton de unu briko kiel senkomparan feliĉon kaj gloron. Ŝtontajlistoj de Lanĝoŭ, lignajistoj de Ŝandong, gravuristoj de Hejlonggiang kaj belartistoj

de Ŝanhajo letere petis permeson fari kontribuon al la konstruado per siaj artoj.


Informiĝinte pri la komenciĝo de la konstruado de la Memorhalo, emerita lignajisto Kju Kiu-song de Kajjuan-gubernio, Junnan-provinco, kiu multege suferis en la malnova socio, tre emociiĝis. Li pensis: "Prezidanto Maŭ savis nin malriĉulojn el la maro de suferoj de la malnova socio. Ĉu mi devas senfare rigardi tion, kiam oni konstruas al li memorhalon?" Li ne povis plu resti hejme, kaj preninte kun si la instrumentan keston li ascendis vagonaron. Post sesdiurna veturado fine li atingis Pekinon. Forlasinte la trajnon, li rekte iris al la konstruejo de la Memorhalo kaj partoprenis en laboro kiel volontulo.

Estis necble kontentigi la deziron de ĉiu el la volontuloj-laborantoj, kiuj tajde alfluis al la konstruejo. Multaj el ili estis permesitaj labori

*La popolo de Fangŝan-gubernio en ĉirkaŭurbo de Pekino zorge elektis nombron da fruktarboj kaj plantis ilin ĉirkaŭ la Memorhalo.*



*Ŝtonhakistoj de Ginan de Sandong penlaboras diurne por plenumi sian taskon de dehako kaj prilaborado de granito.*






tie nur duonan horon kaj eĉ dek minutojn. Eĉ tia mallonga travivaĵo estis memorinda por ili dum la tuta vivo.


### HEROAJ KONSTRUANTOJ


La konstruantoj de la Memorhalo ne vanigis la koran esperon de la tutlanda popolo. Ricevinte la projektan taskon, la pli ol 70 inĝenieraj laborantoj, inkluzive de blankharaj profesoroj kaj junaj projektistoj el 8 provincoj kaj municipoj, diris, ke ili plenumos la prospektoradon kaj projektadon plej rapide kaj plej bonkvalite. Ili kolektis opiniojn de laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj alilokaj projektistoj, konsultis literaturojn kaj serĉis donitaĵojn sen perdo de ĉiu utiligebla sekundo. En iom pli ol unu monato ili jam pretigis pli ol 300 plandesegnaĵojn de la ĉefkonstruata skeleto. Dank' al kolektiva strebado, ili plenumis la projektadon de la tuta halo je 2 monatoj antaŭdate.



*Fajencistoj de Sivan de Guangdong-provinco projektis kaj fabrikis fajencajn platojn kun relieffaj desegnoj por la Memorhalo de Prezidanto Maŭ.*

*Volontuloj laboras sur la konstruejo de la Memorhalo.*





*La popolo de Gínggang-montaro de Gianghi-provinco liveris plej bonajn abiajn trunkojn al Pekino por kontribui al la konstruado de la Memorhalo.*

La ferbetona framo de la Memorhalo estis farata en frosta vintro. Venkinte diversajn malfacilojn la heroaj konstruantoj bone plenumis la taskon.

Granda nombro da heroaj kaj modeloj aperis sur la konstruejo.

Vang Hjueli, honore titolita kiel Ferulo de la konstruejo, estas laboristo de la Sesa Konstrua Kompanio de Pekino. En la malnova socio, li estis almozanta knabo, sed post la Liberiĝo li fariĝis kompartiano kaj labora modelo. Dum la konstruado de la Memorhalo, li laboris kiel vicdirektanto de iu filia komandejo de la konstruejo kaj tagnocte penlaboradis kune kun laboristoj. Li plenumis laboron de pluraj personoj kaj ĉiam aktive laboris kie troviĝis malfacila tasko. Laboristoj diris, ke li estas "homo senripoza sur la konstruejo". Por frue finkonstrui la Memorhalon, li kreis, kune kun aliaj laboristoj, novtipan grandan modelplaton, dank' al kies apliko la konstruado de parto de la skeleto multe mallongiĝis.

Ji-nacieca soldato Giagia Hagu ĉiam plenergie kaj senlace laboradis sur la konstruejo. Dum masonado de brikoj pezaj po 60 kg., li transportis enbrake pli ol 320 pecojn de pli ol 50 metrojn fore en 6 horoj. En sturma fosado por enterigo de kloaktubo, li laboradis 36 horojn kontinue. La kamaradoj laŭdis lin, ke li estas vera nefleksebla soldato.

En majo, kiam la Memorhalo estis finkonstruita, la amasoj elektis pli ol 1,700 avangardajn unuojn kaj pli ol 13,000 heroojn kaj modelojn. Inter ili troviĝis gvidantoj, laboristoj, ĈPLA-anoj, kuracistoj, staplejaj laborantoj kaj kuiristoj. Ĉiu el ili faris sian kontribuon sur sia posteno.

Ĝuste dank' al forta subtenado de la tutlanda popolo kaj diligenta kaj kreiva laborado de miloj da heroaj konstruantoj, la konstruado de la halo povis tute plenumiĝi en duona jaro post la meto de la angulŝtono. La rapida iro de la konstruado siavice akcelis la instaladon de elektraj kondukiloj kaj aparatoj kaj telekomunikiloj kaj verdigon de la medio.

La konstruantoj de la halo rigore postulis, ke ilia laboro estu plenumita kun altaj kvalito kaj normo, kaj sukcesis tiel plenumi ĉiun taskon. Kelkaj el la atingitaj sukcesoj estas admirindaj. Ekzemple, la postulata teknika normo de betonmetado estis 85%, sed la atingita procento estis 99.57%; ĉiu el la pli ol 10,000 granitaj surfacaj pecoj tegitaj sur la muroj kaj kolonoj estas firma kaj bonkvalita; oni postulis ke unu el ĉiuj tri pecoj de la fragilaj fajencaj pecoj kun desegnoj instalitaj supre inter la galeriaj kolonoj devas esti nerompitaj, sed dum la transportado de Kantono al Pekino ĝis la fininstalo, neniuj el la 1,008 pecoj estis rompigitaj. Laŭ la sukcesaj ekzemploj de la Imperiestra Palaco kaj la Ĉiela Altaro kaj aliaj dek kelkaj antikvaj konstruaĵoj, kies tegmentoj ne enlasis pluvakvon dum centoj da jaroj, oni tegmentis la halon per plumbaj kaj aluminiuj platoj unu sur la alia, kaj neniuj el la dekmilo da metroj da velda junto tralasis akvon aŭ aeron.

La skulptado de la statuo de Prezidanto Maŭ, instalado de lia kristala ĉerko kaj diversaj artaj dekoraciaĵoj en la halo estas rapide plenumataj.



# Vojaĝo de la loko de la Aŭtuna Leviĝo ĝis Ginggaŝ-montaro

## VOJO

**A**ŬTUNE ni veturis al Liujang-montregiono en la orienta parto de Hunan-provinco. Proksime verdaj oleaj kamelioj portas neĝblankajn florojn; malproksime sur pintoj de pluraj altaj aceroj montriĝas petaloj iom ruĝigitaj de prujno. Inter tiu smeralda verdo kaj aminda ruĝo etendiĝas granda parcelo de orflava rizo. Ja estas ora riĉrikolta aŭtuno!

Ĝuste kiam ni avide ĝuis la ĉarman aŭtunan pejzaĝon, nia gvidisto subite kliniĝis antaŭen kaj kriis mallaŭte: “Ho, Vengiaŝi!”

“Forpasis jam kvindek jaroj!” diris li kun profunda sento, prenante mian brakon kaj montrante la ondantan montaron ekster la fenestroj de la aŭto. “Ĝuste tra tiu montpasejo Prezidanto Maŭ siatempe venis al Vengiaŝi.”

Lia vorto forkondukis nin de la riĉrikolta kamparo al la fumplenaj malfacilaj jaroj de la granda revolucio.

La jaro 1927 estis jaro de sango kaj fajro. La perfida kaj kapitulaca linio de la dekstra oportunismo de Ĉen Duĥiu ekscitis la reakcian arogantecon de Ĉiang Kajŝek, politika reprezentanto de la grandaj bienuloj kaj burĝoj. Ĝuste kiam la Norden-Ekspedicia Armeo venke marŝis de la Perlo-rivero al la bordoj de Jangzi-rivero, li ĵetis la proletaron en sangan maron. La ardanta granda revolucio fiaskis. La masakrado de la malamikoj komprenigis al la juna Komunista Partio la gravecon de pafiloj, kaj ili ekkonis la marksisman veron “**el pafiloj venas ŝtatpotenco**”. En la 7-a de aŭgusto Kamarado Maŭ Zedong ĉeestis urĝan kunvenon de la Centra Komitato de la Partio en Vuhan, faris firman batalon kontraŭ la dekstra oportunismo de Ĉen Duĥiu kaj elmetis la ĝustan opinion fari arman batalon

kaj agraran revolucion kaj fondi revolucionan reĝimon. Tuj post la fino de la kunveno Prezidanto Maŭ rapidis al Hunan kaj komencis preparadon por la Aŭtuna Leviĝo. Fondiĝis la plej alta gvida organo de la leviĝo — la Fronta Partia Komitato kaj Prezidanto Maŭ laboris kiel ĝia sekretario. Sur la bazo de profunda mobilizo de amasoj Prezidanto Maŭ okazigis militan kunvenon en Anĵuan de Gianghi por fari militajn aranĝojn de la leviĝo. Sekve, en la 9-a de septembro eksplodis la terskua Aŭtuna Leviĝo en la kamparo de orienta Hunan.

La Aŭtuna Leviĝo estis granda agado. Sed pro forteco de la malamikoj kaj malforteco de la leviĝa trupo, kaj manko de sperto de arma batalo al la lasta, la leviĝa trupo malsukcesis en la unuaj bataloj. Ĝi devis retiriĝi de la batalo kaj marŝis sur la montvojo laŭ la limo inter Hunan kaj Gianghi. Tiam pezis sur ĉies koro granda demando: Kien iri kaj kiel konduki la revolucion?

Iun tagon de la meza tagdeko de septembro armeestro Kamarado Lu Deming ricevis de kuriero leteron. La skribaĵo de la letero karakteriziĝas per forteco kaj en la fino de la letero troviĝis la nomo Maŭ Zedong.

La letero estis ĝuste skribita de membro de la Centra Komitato de la Partio Kamarado Maŭ Zedong. Li ordonis la leviĝan laboristan-kampanan trupon kolektiĝi ĉe Vengiaŝi.

La ordinara vilaĝo Vengiaŝi en orienta Hunan tuj vigliĝis. La laborista-kampana revolucia trupo venis tien, ankaŭ multaj revoluciaj batalantoj disigitaj en batalo tien venis.

Ĝuste tiam Prezidanto Maŭ en bluj kampanaj vestoj kaj kun sandaloj sur la piedoj venis inter la leviĝajn batalantojn.



En iu simpla klasĉambro de vilaĝa lernejo iris kunveno de la Fronta Partia Komitato, kiu decidis la sorton de la revolucio. La tiama sekretario de la Fronta Partia Komitato Kamarado Maŭ Zedong detale kaj profunde analizis la situacion post la malvenko de la granda revolucio kaj klare montris: La revolucio en urboj estas venkita de la klasaj malamiko kaj la revolucia situacio portempe sin trovas en malfluso; la grandaj urboj kaj gravaj trafikaj lokoj ne estas lokoj kien ni devas iri.

Kien do ni iru por fari revolucion?

Montrante mapon Prezidanto Maŭ sonore diris: Ni iru al la kamparo, al la montregiono de la meza parto de Luohiaŭ-montaro. Tie estas oportune por fari kaj atakon kaj defendon. Fore de grandaj urboj, la reakcia regado tie estas relative malforta kaj la revolucia standardo povas influi la provincojn Hunan kaj Gianghi, kaj krome tie estas memsufiĉa natura ekonomio, precipe revoluciaj amasoj baptitaj en la granda revolucio.

Frumatene de la 20-a de septembro de 1927, sur ekzercejo banata en la suno Prezidanto Maŭ sciigis tiun saĝan decidon al ĉiuj batalantoj. Per simplaj kaj facile kompreneblaj vortoj li diris: Ni devas iri al loko, kie la forto de la malamiko estas malgranda, por mobilizi amasojn, restarigi energion kaj batali plue kontraŭ la malamiko. Kie estas tia loko? En la kamparo, en Luohiaŭ-montaro. Ni iros al tiu loko por batali kontraŭ bienuloj, distribui agron al kamparanoj kaj fondi revolucion bazlokon. . .

Kvazaŭ printempa vento post frosta vintro la vortoj de Komitatano Maŭ varmigis la koron de la batalantoj kaj, kvazaŭ lampo en obskura nokto, lumigis la revolucion vojon.

Ĝuste en la kriza momento, kiam la ĉielo estis kovrita de nigraj nuboj, super Vengiaŝi eksonis la unua ordono por **“establo de sendependa reĝimo de la laboristoj kaj kamparanoj per armitaj fortoj”**: Antaŭenmarŝu al la meza parto de Luohiaŭ-montaro. Sub la persona gvido de la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ la unua revolucia armeo komencis surpaŝi la antaŭenmarŝan vojon de la ĉina revolucio, la



*En la lasta tagdeko de aŭgusto, 1927, Prezidanto Maŭ kunvokis militan kunvenon ĉe Ĝanggiavan de Anjuang-gubernio de Gianghi-provinco por fari aranĝon pri la Aŭtuna Leviĝo. La foto montras la domon en kiu okazis la kunveno.*

unikan ĝustan vojon fondi revolucion bazon en la kamparo, konservi kaj disvolvi revolucion fortojn, sieĝi la urbojn per la kamparo kaj fine kapti la urbojn.

Nun kiam ni staras antaŭ la vilaĝo Vengiaŝi kaj rigardas la malproksimen etendiĝantan zigzagan montvojon, ni kun profunda amo kaj danko karmemoras la grandajn historiajn kontribuojn de Prezidanto Maŭ. Ĝuste dank' al direktado de la brila penso kapti regpotencon per armitaj fortoj, la revolucio havas la venkan hodiaŭon kaj brilan morgaŭon.

## FLAGO

La revolucia vojo estas zigzaga kaj malfacilega. Hodiaŭ ambaŭflanke de tiu montvojo novaj

ŝtupaj kampoj sterniĝas unuj super aliaj kaj ĈPLA-anoj falĉas rizon kune kun komunumanoj. Kamionoj de marko Ginggaŝan kaj traktoroj de marko Kihongtu plensarĝitaj per orflava rizo brue kuras al grenejoj. Sed antaŭ 50 jaroj tiu vojeto estis plena de malfaciloj kaj danĝeroj. En serena septembro la bruliga suno pendis sur la ĉielo kaj la trupo piediris sur tiu kruta montvojo tagon post tago. Pli kaj pli malmultiĝis la portata greno, kaj pli kaj pli multiĝis malsanuloj. Nemalmultaj kamaradoj falis ĉe voj-rando kaj aliaj prenis de iliaj manoj la pafilojn kaj daŭrigis la marŝadon.

Tio ne prezentis la tutan malfacilon. Post kiam la trupo venis al Luhi-urbeto de Pinghiang de Gianghi kaj tranoktis ĉe ĝi, subite eksonis pafoj frumatene. Du regimentoj de la malamikoj de Gianghi surprizis ĝin. La kamaradoj brave batalis kaj sukcesis trarompi la sieĝon, tamen la trupo suferis gravan perdon. Ankaŭ la supre menciita estro de la revolucia armeo Kamarado Lu Deming oferis sian vivon dum ŝirmado de la granda trupo por evakuo.

La malfacila vivo kaj kruela batalo provis kaj hardis tiun junan revolucionan trupon. Tiuj, kiuj spekulis pri la revolucio kaj havis malfortan volon, ŝanceliĝis kaj postlasiĝis el la trupo pro la grava malsukceso, tamen pli multaj homoj fariĝis ŝtalaj batalantoj.

En tiu kriza tempo Kamarado Maŭ Zedong vicleplene marŝis inter la batalantoj. Li jen helpis soldaton vektporti, jen portis por iu pafilon kaj interparolis kun ili dum irado. Dum la marŝado li faris profundan enketon pri la politika kaj ideologia stato de la trupo kaj pri-pensis ĝian reformon kaj konstruadon. Ĝuste sur tiu malfacila vojo, plano pri fondo de novaj revoluciaj armitaj fortoj iom post iom formiĝis en la kapo de la granda gvidanto.

La reformo, ordigo kaj nova vivo de tiu plej frua revolucia trupo komenciĝis en Sanvan.

Sanvan estas malgranda vilaĝo en Giulong-montregiono, kie troviĝas ĉirkaŭ 50 terdomoj. Ĝi estas la loko, kie la leviĝa trupo siatempe faris la fame konatan "reorganizon ĉe Sanvan".

Ni sekvas la spuron de la siatempa trupo de la Aŭtuna Leviĝo. Tie ni vidis altajn ruĝajn acerojn kaj alte elstariĝintajn rokojn, kiuj estas atestantoj de tiu historia evento.

Iun tagon de la fino de septembro la trupo kolektiĝis antaŭ iu prapatra templo. Starante sur granda ŝtonpeco antaŭ la trupo Prezidanto Maŭ ekparolis. Li diris: La malamikoj povas nur kaŝe pafi demalantaŭe kaj tio estas nenio grava. . .

La kuntiritaj brovoj de la batalantoj disiĝis kaj ili ekridis serene. En postaj tagoj ili multfoje aŭdis la saman vorton de li. Ĝuste en tiu



Panorama  
de Bajŝa



*En septembro de 1927, la trupo de la Aŭtuna Levigo sub la gvido de Prezidanto Maŭ organiziĝis en la Unuan Divizion de la Unua Armeo de la Laborista-Kampana Revolucia Armeo. La foto montras la flagon de tiu divizio.*

simpla vorto la batalantoj ekkomprenis la veron ke ni devas malestimi ĉiujn malamikojn en strategio.

Prezidanto Maŭ detale eksplikis la signifon de la reorganizo. Por pli bone fondi sendependan reĝimon de la laboristoj kaj kampanoj per armitaj fortoj, la trupo nepre devas reordigi sin en politiko, ideologio kaj organizo.

Post la reorganizo la divizio fariĝis regimento nomata la Unua Regimento de la Unua Divizio de la Ĉina Laborista-Kampana Revolucia Armeo. La regimento konsistis el du batalionoj kaj unu speciala kompanio kun preskaŭ mil homoj, pli ol 700 pafiloj kaj 48 ĉevaloj.

Samtempe kun la reordigo en organizo, estis praktikata la grava sistemo “fondi partian filion en la kompanioj”. Antaŭe la partiaj filioj funkciis en la regimentoj. Tiutempe en ĉiu subploto kaj plotono establiĝis partia grupo, en ĉiu kompanio partia filio, super kompanio partia reprezentanto kaj super bataliono partia komitato. La Fronta Partia Komitato estis la partia

gvida organo de la tuta trupo kaj Kamarado Maŭ Zedong estis ĝia sekretario. Tiamaniere stariĝis la fundamenta principo “la Partio komandu la pafilojn” kaj efektiviĝis absoluta gvidado de la Partio al la armeo, kio metis bazon por konstrui novan proletan revolucian armeon.

Kiel energie Prezidanto Maŭ klopodis por praktiki tiun principon! Mi intervjuis veteranan batalanton, kiu tiutempe aliĝis al la Partio, kaj li rakontis al mi kiel Prezidanto Maŭ fondis partian filion en kompanio.

“Sur rando de la tablo pendis ruĝa partia standardo”, li rememoris. “Mi unuafoje kunvenis antaŭ la partia standardo. La kunveno prenis lokon en granda prapatra templo. Venis Komitatano Maŭ. Li iris al ni ses novaj partianoj kaj faris al ni unu post alia multajn demandojn. Li demandis al mi: ‘Kial vi volas aliĝi al la Komunista Partio?’ Mi respondis: ‘Por liberiĝi, faligi bienulojn, lokajn tiranojn kaj firme revolucii!’ En la kunveno regis serioza atmosfero. Komitatano Maŭ levis sian dekstran manon super sian kapon kaj gvidis nin en voĉlegado de jurteksto. Mi imitis lin vorton post vorto kaj la sonora kaj majesta sono vibris en la kaduka subtegmento.”

La novaj kompartianoj persone varbitaj de Prezidanto Maŭ kaj partiaj filioj fonditaj de li en kompanioj alte tenis la partian standardon antaŭ la armeo kaj havigis al ĝi politikan animon, kio metis solidan bazon por konstrui poste la armeon. Ĉu en la rigora batalo en Gingsang-montaro aŭ sur la malfacila vojo de la Longa Marŝo, aŭ en defendo de la diktaturo de la proletaro kiel forta kolono, tiu popola armeo disvolviĝis de malforteco al fortenco ĝuste dank’ al la absoluta gvido de la Partio difinita de Prezidanto Maŭ.

Je la tagiĝo de la 3-a de oktobro aŭdiĝis sonora milita klariono en tiu izolita montvalo. La revolucia Laborista-Kampana Armeo, la **“armita klico praktikanta revolucian politikan taskon”** kun tute nova ideologia fizionomio ekmarŝis al Gingsang-montaro sub la gvido de Prezidanto Maŭ.

(Daŭrigota)



# En malfacilaj tagoj

**E**N la 13-a de aprilo, 1947, la gvida institucio de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio sekure translokiĝis al Vangjavan.

Ĝi estis malgranda vilaĝo apud monto kun leŭsaj deklivoj kaj vicoj da kavernodomoj. Prezidanto Maŭ, Vicprezidanto Ĝoŭ Enlaj, Kamarado Ĵen Biŝi kaj aliaj kune loĝis en granda kavernodomo. Prezidanto Maŭ loĝis en ĝia maldekstra ĉambreto, Kamarado Ĵen Biŝi en la dekstra, Vicprezidanto Ĝoŭ kaj aliaj du en la centra, kiu ankaŭ servis por la gvidantoj kiel la sola kunvenejo kaj loko por diskuti pri problemoj.

La kavernodomo estis kaduka kaj malhela. En la ĉambreto estis terlito kaj malgranda tablo. Ĝi estis tiel malvasta, ke unu homo eĉ ne povis sin turni en ĝi; sed Prezidanto Maŭ loĝis en ĝi pli ol unu monaton, ĉiutage ekzamenante raportojn, esplorante problemojn kaj farante instrukciojn.

La gvidantoj vivis kune, zorgante unu alian, eĉ pri bagateloj. Ili sin movis senbrue kaj parolis mallaŭte. Se iu el ili volis labori en nokto, tiu ĉiam ŝirmis flankon de la lampo por ne ĝeni dormon de la aliaj kamaradoj. Se iu gvidanto ripozis en tago, la aliaj ĉiam laboris senbrue. Se laŭtaj voĉoj aŭdiĝis ekster la kavernodomo, Vicprezidanto Ĝoŭ senbrue eliris kaj atentigis la aliajn per mangesto ke ili parolu mallaŭte. La nobla revolucia amikeco inter la gvidantoj profunde kortuŝis nin kaj plifortigis la solidarecon inter mi kaj la kamaradoj.

La aero en la kavernodomo estis stagna kaj la vetero pli kaj pli varmiĝis. Kliniĝante super la tablo kaj senĉese svingante ventumilon, Prezidanto Maŭ ofte atente legis telegramojn en nokto, notis demandojn kaj ciferojn en raportoj, atente kalkulis kaj serioze pripensadis. . .

Kiam ni purigis lian ĉambreton, ni trovis ke malaperis duono de la paperfolioj hieraŭ metitaj sur la tablo, aliflanke staris alta stako da manuskriptoj faritaj de Prezidanto Maŭ. Kaj iafoje sur la tablo kuŝis paperpecoj plenaj de ciferoj. Kiom da energio nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ pagis en unu ordinara nokto por akiri venkon de nia revolucia milito!

Tiutempe, Ŝandong kaj la Nordokcidento estis la ĉefaj celajoj de la malamika atako. Ĉiufoje antaŭ ol ni ricevis informojn pri granda venko de la du batalkampoj, ni vidis en profunda nokto, ke Prezidanto Maŭ atente observis, faris signojn kaj profunde pripensadis sin klinante super la terlito plene kovrita de mapoj, kun kandelo en unu mano kaj ruĝa-blua krajono en la alia. Tio montris ke li projektis por la popolo de la tuta lando morgaŭan venkon.

Vespere, Prezidanto Maŭ kelkiam eliris por ripozi aŭ promeni, kaj ĉiufoje li zorgeme demandis al ni pri la vivo kaj lernado. Iufoje, li demandis min: "Longĉjo, kiel statas la enlanda situacio laŭ vi?" Mi respondis: "Bonege, Hu Zongnan jam falis en nian kaptilon!" Kun rideto Prezidanto Maŭ afable diris: "Jes! Nun la tuta registaro de Ĉiang Kajŝek estas en sieĝo de la tuta popolo!" Iom poste, li intime diris al mi: "La malfacilo de la malamiko estas multe pli granda ol la nia." Montrante antaŭen per la mano li diris: "Nia malfacilo estas tiu renkontita sur la vojo al la venko kaj tiu sur la malglata vojo en marŝado al la nova Ĉinio!"

Post laboro, Prezidanto Maŭ iam venis vidi nin en nia loĝejo. Iufoje, li atente pririgardis nian kabanon kaj diris kun kora zorgo: "Via loĝejo ja estas pli malbona!" La laborantoj ĉe Prezidanto Maŭ, plejparte malnovaj kamaradoj spertintaj la Longan Marŝon, diris emocie: "La

loĝejo de Prezidanto Maŭ estas eĉ malpli vasta ol la nia! Komparante la nunon kun la tempo de la Longa Marŝo, nia loĝejo egalas al domo.” Tion aŭdinte, Prezidanto Maŭ kontente kapjesis.

Vanggiavan distancas de Panlong okupata de la malamikoj nur ĉ. 50 km. Iafoje malamikaj spionoj eĉ alŝteligis al la ĉirkaŭaĵo de Vanggiavan por fari gvatadon. Niaj gvidantoj, vivantaj oriente de la Flava Rivero ĉiam zorgis pri la sekureco kaj sano de Prezidanto Maŭ. Kamarado He Long aparte sendis al li siajn du bonajn ĉevalojn por ke li povu sekure militiri, kiam la situacio postulos tion. Sed Prezidanto Maŭ ridete diris al ni: “Mi forlasis Jan-an per aŭto kaj rajdis al Kingjangĉa. Se mi iam moviĝos, mi devos uzi la piedojn. Donu la bonajn ĉevalojn al trupo por militado. Komandanto He Long bezonas ĉevalojn en militado, mi povas piediri.” Je tio, mi ekpensis ke veninte al Vanggiavan, li ofte faris promenon longan kelkiam je pluraj km. — per tio li sin hardis por adaptiĝi al la venonta militiro!

Tiutempe, la gvidantoj vivis tre malfacile kaj ofte sin nutris per kruda greno. Vicprezidanto Ĝoŭ ĉiufoje prenis al si manĝaĵon el kruda greno kaj restigis delikatan manĝaĵon al Prezidanto Maŭ. Kaj la Prezidanto foje-refoje rifuzis tion kaj volis restigi ĝin al malfortaj kamaradoj. Ili longe ne vidis viandon kaj eĉ legomoj estis malfacile akireblaj. Ĉiutage, ili manĝis nur malmulte da terpomoj. Iufoje, kiam mi promenis kun Prezidanto Maŭ, montrante specon de herbo li diris: “Ni povas preni ĝin kiel legomon, mi iam manĝis ĝin en la hejmloko kaj en la Longa Marŝo ni ĉiuj prenis ĝin kiel manĝaĵon.” Post tio, ni eliris kolekti tian herbon en libertempo kaj al la manĝaĵoj de la gvidantoj aldoniĝis freŝa legomo.

Prezidanto Maŭ laboradis ofte tutan nokton, lia manĝaĵo estis tre malbona, kaj li malgrasiĝis iom post iom. Tion rimarkinte, mi maltrankviliĝis. Kuŝante sur la lito, mi pensis ke la Partio asignis al mi la taskon zorgi pri vivo de Prezidanto Maŭ. Ĉu mi devas tiel plenumi ĝin? Iutage, antaŭ la tagiĝo mi iris al vilaĝestro Gaŭ kaj demandis al li kie oni povas aĉeti kokon.

La maljunulo diris: “Tion oni ne povas aĉeti en la najbareco, mi iru al Gingbian, kie mi eble akiros tion.” Gingbian distancas de Vanggiavan je 30 km. da montvojo kaj oni bezonas du tagojn por la ir-reiro. Mia konscienco ne permesis al mi ŝarĝi la maljunulon per tia peno kaj mi diris: “Vi havas multan laboron en la vilaĝo kaj jam maljuniĝis, do vi ne devas iri tien. Mi sendu iun el nia trupo.” La maljunulo diris malkontente: “La gvidantoj loĝas en nia vilaĝo, tag-nokte laboradas por la popolo, sed ilia manĝaĵo estas sama kiel la nia. Ni estas maltrankvilaj ĝuste pro tio! Sur la vojo multas spionoj de la trupoj de Hu Zongnan. Mi konas la vojon, havas multajn konatojn en la ĉirkaŭaĵo kaj povas sekure trapasi. Se iu alia iros tien, mi estos maltrankvila pro lia sekureco!” Post mia longa persvado, li ankoraŭ insistis pri sia ideo kaj mi devis lasi lin iri.

Sed neatendite, tiutage Prezidanto Maŭ volis vidi la vilaĝestron por paroli kun li pri la aranĝo de la amasa vivo. Mi devis diri al li, ke la vilaĝestro iris al Gingbian. La sekvintan tagon, la maljunulo revenis. Mi diris al li ke mi ne sciigis Prezidanton Maŭ pri la aĉeto de koko. La maljunulo diris kun rideto: “Ne grave, mi diros tion al li!”

Aĉetinte kokon, ni devis prepari ĝin por manĝo. Tio estis malfacila tasko por mi. Mi elpensis multajn vortojn por respondi al pride-mando de Prezidanto Maŭ. Sed li jam travidis mian penson kaj afable instruis min: “Hieraŭ maljunulo Gaŭ diris al mi, ke provizo de greno al la amasoj ankoraŭ ne estas bone aranĝita. Ni devas ŝpari grenon por ke la popolanoj ne malsatiĝu! Vi sendis lin iri al tiel malproksima loko por aĉeti kokon. Ĉu mi povus preni ĝin? Ĉiam memoru ke ni estas servantoj de la popolo, ĉiam pensu pri la popolo kaj ĉie dividi kun la popolo dolĉon kaj maldolĉon. Neniom da privilegio ni devas ĝui! Vi donu la kokon al Vicprezidanto Ĝoŭ, li estas malforta. Vidu, ĉu mi ne estas sufiĉe sana?” Li diris kun sonora rido kaj ame min rigardadis.

Aŭdinte la instruon, mi estis kaj emocia kaj ĉagrena, kaj ne sciis kiel fari. Poste, Vicprezi-

# Sekvi Ĉefkomandanton ĜU DE

(Daŭrigo)

### III

**I** UTEMPE la liberigitaj regionoj troviĝis en serioza malfacilo de financo kaj ekonomio, kaŭzita de senĉesa “balaado” kaj rabado fare de la japanaj agresantoj, sieĝado kaj blokado fare de Kuomintango kaj naturaj katastrofoj. Tiam al la liberigitaj regionoj ĝenerale mankis greno, kotonŝtofo, medikamento, municio kaj ĉiutagaj bezonaĵoj. Por daŭre batali kontraŭ Japanio kaj venki la malfacilon, Prezidanto Maŭ elmetis la principon “produktu por sin provizi” kaj alvokis la armeon kaj popolon de la limregiono disvolvi grandan produktan movadon kaj elitigi trupojn kaj simpligi administrajn instituciojn.

Somere de 1940, reveninte al Jan-an, la sidejo de la Centra Komitato de la Kompartio, Ĉefkomandanto Ĝu aktive respondis la alvokon de Prezidanto Maŭ kaj reduktis sian sekvantaron al duono, sendis la alian duonon al Nannivan por

starigi kultivejon. Ĉefkomandanto Ĝu atentis ne nur politikan edukon, sed ankaŭ produktan aferon. Li diris al ni, ke produktado fare de komandantoj kaj batalantoj estas nova metodo por vivteni la armeon kaj ĝi havas gravan signifon ne nur por plibonigi la vivon, sed ankaŭ por malpezigi ŝarĝon de la popolo, plifortigi la unuigon de la armeo kun la popolo kaj plialtigi kvaliton kaj militan trejnadon de la armeo.

Kvankam Ĉefkomandanto Ĝu tiam jam estis pli-ol-50-jara kaj okupata de multaj gravaj laboroj, tamen li ankoraŭ elpremis certan tempon por partopreni en produktado, ekzemple planti arbojn, kulturigi legomojn, ŝpini fadenon k.a. En Vanggiaju de Ŝanhi-provinco, li plantis multe da arboj ĉirkaŭ la domo, kaj tiuj arboj nun estas tre altaj. En Vanggiaping de Jan-an, li kulturis duonmuon da legomoj (1 muo = 1/15 hektaro) matene kaj vespere. Ĉefkomandanto Ĝu estis

---

danto Ĝoŭ proponis ke la gvidantoj kune manĝu la kokon, kaj tiel solviĝis la problemo.

La malluksa vivstilo de la gvidantoj kaj ilia fidela kaj energia laborado por la proleta afero estas por ni plej bona eduko de komunisma penso. Kvankam la materia vivo de ni laborantoj ĉe Prezidanto Maŭ estis relative malfacila, tamen ni neniam plendis pri tio.

Ni nutris nin per kruda greno kaj dormis en vilaĝana kaduka ĉevalstalo kiu eĉ ne povis ŝirmi nin kontraŭ pluvo kaj vento. En la stalo estis dika tavolo da azena fekajo, kiu estis ĉefa sterko de la dommastro por semado. Por ne senefikigi ĝin oni ne devis transmeti ĝin eksteren, kaj neniu alia domo povis enteni ĝin. Fine ni

elpensis solvon: Sur la fekajon ni sternis tavolon da tero kaj dormis sur ĝi. La stalo estis por ni tro malvasta, mi kaj alia devis dormi en ligna staltrogo. Kamaradoj kuŝantaj sur la fekajoj ŝerce diris: “Ho, kamaradoj de la supra etaĝo, vere feliĉaj vi estas havante domegon kiel loĝejon!” Ni bonhumore respondis: “Kuŝante sur kanapo ankaŭ vi vivas ne malpli bone! Revoluciuloj ne devas kalkuli materian ĝuon. Estonte, kiam efektivigos la komunisma socio, ni vin transloĝigos en paradizon, ĉu bone?”

La vivo estis peniga, tamen senkompare bela; en la militaj jaroj, nia vivo vere estis multe pli bela ol kiam ordinaraĵoj povas prezenti al si!



multescia pri legomkulturado. Li kulturis multe da specoj, el kiuj iuj semoj estis senditaj de Kamarado Ĝou Enlaj el Ĉongking. Sekvante lian ekzemplon, ni ĉiuj arde disvolvis la movadon de granda produkto. Ĝuste per tio ni plibonigis nian vivon. Dimanĉe multaj kamaradoj venis por viziti Ĉefkomandanton Ĝu. Se ili venis al ni en la tempo por manĝo, ni regalis ilin per legomoj produktitaj de ni mem. Ili ĉiuj manĝis kun bona apetito.

Tiutempe en la movado de granda produkto la plej fama estis Nannivan 45 kilometrojn for de Jan-an. Antaŭ la movado, tie estis sovaĝaj montoj kaj arbaroj, kaj ofte aperis leopardo, lupo kaj aliaj rabobestoj. Oni diris, kiu iros en Nannivan, tiu tie mortos. Krome cirkulis superstiĉo pri sorĉaĵoj de demonoj. En aŭtuno de 1940, Ĉefkomandanto Ĝu venis al Nannivan kune kun kamaradoj. Tie ili ĉiutage inspektis terformon kaj esploris rimedon por ekspluatado, hakante dornojn, surgrimpante montojn kaj travadante riverojn. Dum la ekspluatado de la tero Ĉefkomandanto Ĝu renkontis maljunulon Tang. Li naskiĝis en Siĉuan-provinco, kaj antaŭ kelkdek jaroj lia patro migris al Nannivan. Aŭdinte tion, Ĉefkomandanto Ĝu kore diris al li: "Maljunulo Tang, ni estas samlokanoj! Ni volas entrepreni produktadon en Nannivan, bonvolu esti nia konsilanto." Poste Maljunulo Tang tre fervore helpis kaj direktis nin en esploro kaj produktado kaj fariĝis nia produkta konsilanto.

Kiam ni venis al la vilaĝeto Ginpenvan en Nannivan, ankaŭ Kamarado Vang Ĝen, la estro de la 359-a brigado de la Okavoja Armeo rapidis tien. Ĉefkomandanto Ĝu detale instrukciis al Vang Ĝen, kiel ili devas ekspluati Nannivan. Por rapide ekspluati Nannivan, sciencistoj, kiuj venis kune kun ni, analizis la grundon kaj akvon de Nannivan kaj trovis ke la akvo entenas venenon pro stagnado de pluvakvo, putrado de herboj kaj folioj en densaj arbaroj. La sciencistoj diris al Ĉefkomandanto Ĝu, ke la akvo puriĝos kaj la veneno estos eliminata, se oni fosos drenajn kanalojn por forkonduki superakvon kaj ŝanĝos originan medion. Komence de 1941, la 359-a brigado ekfaris peneman ekspluatadon kaj post unu jaro kun iom pli, la fizionomio de Nan-

nivan tute ŝanĝiĝis. Ĝi fariĝis ne nur grenejo de Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono, sed ankaŭ ripozejo de la armeanoj kaj popolanoj. En julio de 1942, Ĉefkomandanto Ĝu invitis kvar maljunajn kamaradojn Hju Teli, Hie Gjuezaj, Vu Juĝang kaj Hju Fanting viziti kaj inspekti Nannivan, kaj mi sekvis ilin. Veninte al Nannivan, ni vidis ke la monto estas kovrata de verdaĵoj, kaj sub ĝi fluas kanaletoj. Krom sorgo, milio kaj aliaj plantoj, tie kreskis ankaŭ rizo. La armeanoj entreprenis kaj agrikulturon kaj industrion. Enirinte la korton de artileria regimento ili vidis ke kukurboj amasiĝis montete. Ĉefkomandanto Ĝu diris ridante: "Ha! Kiel multe da kukurboj. Sufiĉas por longa tempo." Iu soldato, leganta libron, stariĝis kaj respondis: "Ni jam manĝis multe da ili, sed ankoraŭ ne povas finmanĝi." Iu el la kvar maljunuloj diris: "Se vi ne povas finmanĝi ilin, do ni helpu vin." Tion aŭdinte, ĉiuj ridegis. En Nannivan Ĉefkomandanto Ĝu kaj la kvar maljunuloj faris viziton, kunsidon kaj manĝis kukurbon. Ili entuziasme verkis versojn en gaja humoro. En sia poemo «Vizito al Nannivan Kune kun Ĉefkomandanto Ĝu» Kamarado Vu Juĝang skribis:

*Venas amasoj de diversaj flankoj,  
Unuanime penas kaj klopodas.  
Fervoras laboristoj, kamparanoj  
Kaj batalistoj en labor' kaj stud'.  
L' aero tiel freŝas resanige:  
Kuracon oni tute ne bezonas.  
Feliĉa land' ĉi-lokon oni nomas.  
Malsaton jam neniu konas plu.*

La poemo aŭtentike priskribis la staton de Nannivan.

En Nannivan iam estis granda leopardo, kiu ofte mortigis dombestojn de kamparanoj kaj eĉ vundis homojn. Sciinte tion, Ĉefkomandanto Ĝu decidis sendi intendanton kaj du gardistojn por mortigi la danĝeran beston. La tri batalantoj iris en la arbaron kaj mortigis la leopardon. Ili reportis la leopardon kaj faris per ĝi frandaĵon por la manĝo de la Printempa Festo de 1942.

Ĉefkomandanto Ĝu ĉiam vivis tre mallukse. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito li havis ĉevalon kiel sian trafikilon. Sed li ĉiam



*Kamarado Ĝu De kune kun Kamaradoj Ĝoŭ Enlaj kaj Je Ĝianĵing*

iris piede kune kun ni, por ke la ĉevalo portu materialon, vunditon aŭ malsanulon. Dum la movado de granda produktado de Nannivan, Kamarado Nie Ĵongĝen, komandanto de la Ŝanĥi-Ĉahar-Hebej-a Milita Regiono, donacis al li grandan nigran ĉevalon, sed li lasis la ĉevalon tiri veturilon por porti lignon kaj grenon de Nannivan al Jan-an. En la bazlokoj Tajhangmontaro li ĉiam prenis manĝon saman al la nia, kaj en la plej malfacila periodo, same kiel la aliaj, li persone iris por kolekti manĝeblajn herbojn. Liaj vestoj, ŝuoj kaj ŝtrumpoj estis multfoje flikitaj kaj li ne volis porti novajn. Li postulis, ke ni ne prenu pli da manĝaĵo ol kiom nia porcio kaj ŝparu karbon. Se iu difektis kolektivan objekton, li paciencie edukis lin. Foje Ĉefkomandanto Ĝu ĉeestis la kunvenon de nia partia grupo. Kiam ni menciis la du problemojn pri produktado kaj ŝparo, li signifoplene diris: “Nia armeo devas sperti saman sorton de la po-

polo, devas produkti kaj ŝpari same kiel la popolo kaj ne devas teni sin aparta ol ĝi. Nur tiel ni povas venki la japanajn agresantojn kaj akiri la venkon de la revolucio.” Ĉefkomandanto Ĝu ĉiam estis nia modelo en observado de diversaj reguloj kaj disciplinoj.

#### IV

En la militaj jaroj, kvankam la kondiĉoj estis malfacilaj, tamen Ĉefkomandanto Ĝu ĉiam persistis en lernado de verkoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj verkoj de Prezidanto Maŭ. Dum marŝado, li utiligis ĉiun liberan tempon por lerni. Kiam la ĉefstabo sidis en Vangĝiaju, nia armeo ĝuste frontis la malfacilan periodon de opono kontraŭ la japanaj rabistoj kaj kontraŭ konflikto provokita de Kuomintangaj reakciuloj. Tiam Ĉefkomandanto Ĝu ofte studis vespere «Pri Longdaŭra Milito» kaj aliajn verkojn. Iufoje li studis ĝis profunda nokto. El

*Kamarado Ĝu De direktas militadon kontraŭ la japanaj agresantoj en ilia postfronto de norda Ĉinio.*



fenestro mi vidis, ke li substrekis sur la libro per kraĵono kaj skribis ion sur papero, kaj poste li iris rigardi mapon tenante olelampon. En tia tempo mi ne devis ĝeni lin, kaj tiel li studis ĝis kokeriko.

Krom persona lernado Ĉefkomandanto Ĝu ofte lernis kune kun ni gardistoj kaj laborantoj. Li instruis al ni: “Por bone entrepreni revolucion oni nepre devas lerni verkojn de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj verkojn de Prezidanto Maŭ. Lerno neniam povas esti ĉesigita kiel sangocirkulado en homa korpo. Nur per konstanta lernado oni povas scii kial kaj kiel revolucii.” En la armeo Ĉefkomandanto Ĝu ofte emfazis, ke ni devas serioze lerni la militajn verkojn de Prezidanto Maŭ. Kiam ni renkontis malfacilon en lernado, li donis al ni helpon. Kiam ni havis nesolveblajn problemojn en laborado, li lernis kune kun ni, pacience klarigis al ni revolucion veron kaj rakontis revoluciajn historiojn por altigi nian ideologian konscion, fortigi nian fidon pri venko super malfaciloj kaj kreskigi nian talenton de batalo kontraŭ la malamiko.

Ĉefkomandanto Ĝu senŝanceliĝe fidis la revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Li diris: “La kombino de la ĝusta politika principo kun ĝusta milita principo fare de Kamarado Maŭ Zedong kreis la popolan armeon, la liberigitajn regionojn, la demokratian aliancan registaron de la liberigitaj regionoj konsistantan el tri egalaj partoj (nome triono de kompartianoj, triono de nekompartiaj maldekstruloj kaj triono de neŭtralluloj), la veran popolan militon de la liberigitaj regionoj, dank’ al kio la batalo de la liberigitaj regionoj senĉese akiris grandajn venkojn.” Li tre respektis kaj amis Prezidanton Maŭ. Kiam Prezidanto Maŭ kunvokis kunvenon, li ĉiam unue venis plej frue kaj ne lasis Prezidanton Maŭ atendi lin. Li ĉiam rezolute plenumis la instrukcion kaj dispozicion faritajn de Prezidanto Maŭ.

Ĉefkomandanto Ĝu estis kaj milita komandanto kaj ordinara soldato. Li ofte invitis Kamaradon Jen Biŝi, estron de la Politika Departemento de la Okavoja Armeo, kaj aliajn kamaradojn por kune ludi korbopilkon kaj volebalon.



Kiam ili partoprenis en ludado de pilko, ni havis pli da intereso kaj venis pli da rigardantoj. Tiam ankaŭ kamparanoj venis por rigardi, kaj la sportejo plenis de vigleco kaj varma atmosfero. Iufoje li kaj ni kune faris korbopilkan matĉon kun kamparanoj.

Foje Ĉefkomandanto Ĝu loĝis kune kun ni ĉe iu kamparano de Hiang-juan-gubernio tri-kvar monatojn. Ni havis tre bonan rilaton kun la kamparano kaj ofte produktis kaj babilis kune kun li. Li intime nomis Ĉefkomandanton Ĝu "Maljunulo". Iufoje li kaj kelkaj kamparanoj diris al mi: "Via maljunulo, simile al kampulo, estas ŝparema en vivo, lerta en produkto, entuziasma al aliaj kaj ĉiam intima kaj afabla en interparolado kun aliaj. Tamen li ne estas soldato, ĉar mi vidas, ke vi ofte sekvis lin kun pistolo kaj iuj kamaradoj rajdis de aliaj lokoj, por raportoj al li. Kia estro li vere estas?" Mi respondis: "La N-ro Unua" (tio estis tiama kaŝnomo de Ĉefkomandanto Ĝu en la Okavoj

Armeo). Oni refoje demandis: "Kia estro estas 'La N-ro Unua' en via Okavoj Armeo?" Mi respondis: "Regimentestro." Iuj el ili kredis kaj aliaj ne plu demandis vidante ke mi tenas sekreton kontraŭ ili. Iutage, knabo de la mastro lernis la donitajn lecionojn kune kun aliaj knaboj en la korto kaj iu el ili demandis: "Kie estas Prezidanto Maŭ?" Alia respondis: "En Janan." Tiu denove demandis: "Kie estas Ĉefkomandanto Ĝu?" Tiu ĉi ree respondis: "En norda Ĉinio. Sed precize kie, mi ne scias." Ili daŭrigis: "Kiel bone estos, se ni vidos Prezidanton Maŭ kaj Ĉefkomandanton Ĝu!" Tiam mi staris apud ili kaj ne povis deteni min de rido aŭdinte ilian interbabilon. Kiam ni translokiĝis, iu avino tenis min je la mano kaj diris: "Kamarado, vi trompis nin!" Mi demandis, kio estas tio. Ŝi diris: "Tiu maljunulo ja estas Ĉefkomandanto Ĝu!" Mi mire respondis: "Kiu diris al vi? Mi ne scias." Ŝi daŭre diris: "Vi ankoraŭ sekretas al mi? Mi persone aŭdis, ke iu kamarado



*En 1937 Kamarado Ĝu De ludis volebalon kune kun lernantoj de la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Kolegio.*

do nomis lin ĉefkomandanto.” La afero staris tia: Iufoje Kamarado Liu Boĉeng kaj aliaj kamaradoj venis al la ĉefstabo por kunveni. Vidinte Ĉefkomandanton Ĝu ili kriis: “Ĉefkomandanto, kiel vi fartas?” Tiun vorton aŭdis la avino. Ŝi diris plue: “Ĉefkomandanto Ĝu neniam montris sin altrangulo. Se mi ne aŭdus de aliaj, mi neniel povus scii, ke li estas ĉefkomandanto.” Antaŭ la foriro, la kamparanoj ripete atentigis nin bone gardi kaj prizorgi Ĉefkomandanton Ĝu.

Dum ĉ. 8-jara servado ĉe Ĉefkomandanto Ĝu, mi vidis ke li ĉiam estis intima kaj afabla al la kadroj kaj soldatoj de la armeo, al civitanoj kaj al lokaj kamaradoj. Li donis multan prizorgon kaj amon al kamaradoj, kaj paciencie helpis ilin, tial ni ĉiuj ŝatis kunesti kun li kaj volontis korversi al li. Foje en Jan-an, mi kolere riproĉis iun gardiston kiu difektis la ŝelon de la arbo plantita de Ĉefkomandanto Ĝu. Sciinte tion Ĉefkomandanto Ĝu diris al mi: “La kadroj devas ami la soldatojn kaj paroli al ili mildvoĉe.”

Dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, por laŭdi Ĉefkomandanton Ĝu iu revolucia veterano verkis jenan version:

*Merito senkompara post la front' de l' malamiko.*

*Hero' unika kiel ŝtalo de milfoja forĝo.*

Sed Ĉefkomandanto Ĝu ne atribuis al si la revolucian meriton. En sia poemo «Dediĉe al Amiko» li skribis:

*Repren' de l' norda land' — merit' de l' bravaj batalistoj,*

*kiuj ja amasiĝis nube pri venteg' kantante.*

Laŭ la vido de Ĉefkomandanto Ĝu, nur la popolo estas la movforto kreanta la mondan historion, kaj la amaso estas vera heroo.

En Tajhang-montaro mi vidis ke sur ĝi kreskas multe da pinoj. Tiuj pinoj vivas inter la alispecaj arboj kaj konsistigas la arbaron, tamen ili havas sian propran stilon ol la aliaj. En la frosta neĝblova vintro ili fortike staras; kaj en varmega somero ili kreskas en prospereco kaj favoras homojn per ombro. Dum tiuj revoluciaj militaj jaroj mi trovis en Ĉefkomandanto Ĝu stilon kaj spiriton de verda pino.

Ĉefkomandanto Ĝu jam forpasis, kaj pinoj ankoraŭ staras tie. Sed, ili vivas nur en la naturo, kaj Ĉefkomandanto Ĝu vivos tamen ĉiam en nia koro!

(Fino)



## GRANDA ALKALA MINEJO

La geologia fako de Henan-provinco trovis grandan bonkvalitan alkalan minejon en Vuĉeng kaj per tio akiris novan riĉfonton por disvolvi nian industrion.

Alkalo estas grava materialo de industrio. El ĝi oni povas ekstrakti puran kaj kaŭstikan alkalon, kaj

ankaŭ povas uzi ĝin kiel krudan materialon por prepari vitron, sapon kaj purigilon, paperon, teksaĵon, petrolon, kaŭĉukajon kaj manĝaĵon, kaj kiel helpan materialon en la metalurgia industrio.

La alkala minejo havas gigantan konservokvanton kaj ĝia minajo entenas grandan pocenton de alkalo. La mino troviĝas en stratumo, en kiu oni ne trovis tian minon en nia lando en la pasinteco, tial la eltrovo larĝigis nian vojon por trovi minajn riĉfontojn kaj helpas en geologia studo.

## RARAJ ARBOJ

Forstistoj de nia lando trovis du gravajn specojn de raraj arboj “ĉielapoganto” (*Chingtian parashura*) kaj “ĉielenrigardanto” (*Wang-*

*tian parashura*) respektive en la Guanghi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono kaj Junnan-provinco.

Tiuj du larĝfoliaj arboj havas grandan ekonomian valoron pro la bona kvalito de ilia ligno. Iu el la trovitaj ĉielapogantoj dikas je 250 cm. kaj altas je 60 metroj. Sola tia arbo povas liveri pli ol 40 kubmetrojn da ligno. Ĉar ĝia ligno estas malmola, egalstruktura kaj belvejna, ĝi taŭgas por fari altklasan meblon, tavollignon, muzikilon kaj sportinstrumenton, kaj por konstrui domon, ponton, ŝipon kaj vagonon.

La “ĉielenrigardantoj” kreskas en la montaro je 760—1100 metroj super la mara nivelo kaj havas altecon eĉ de 70 metroj.

# Du junuloj brave batalantaj kontraŭ la “kvarpersona bando”

*De oktobro de 1976, ĉinaj jurnalaj sinsekve publikigis artikolojn pri personoj kaj kolektivoj, kiuj brave batalas kontraŭ la “kvarpersona bando”. Ĉi tie ni prezentas al niaj legantoj Ĝu Ginduo, instruiston kaj aktoron de luktarto de la Ŝanhaja Jueĝju-opera Trupo kaj Ĉen Dehuj, ruĝgardianon de la Unua Mezlernejo de Jong-an-gubernio de Fugian-provinco. En la Granda Proleta Kultura Revolucio, ili iom post iom konis la kontraŭ-revolucian vizaĝon de la “kvarpersona bando” el ĝiaj agoj kaj malkovris ĝiajn krimojn en siaj leteroj al Prezidanto Maŭ kaj la partia centra komitato kaj en dazibaŭoj. Ili kuraĝis malkaŝi kaj kritiki eraran tajdon, timante nek senkapigon nek enkarcerigon. Hodiaŭ, iliaj leteroj kaj dazibaŭoj fariĝis historiaj atestoj pri la batalo de la revoluciaj popoloj kontraŭ la “kvarpersona bando” kaj samtempe montris ke la bando estis tre izola en la ĉina popolo.*

— La Red.

## ĜU GINDUO KAJ LIAJ LETEROJ

Posttagmeze de la 2-a de novembro, 1976, amasa kunveno de indigna kritiko kontraŭ la “kvarpersona bando” varme iris en la ekzerca ĉambro de la Ŝanhaja Jueĝju-opera Trupo.

Tiutempe, iom-pli-ol-30-jara viro en bluzo el kruda ŝtofo suriris la podion kun emociaj larmoj. Li indigne diris: “Nun mi akuzu la ‘kvarpersonan bandon’ pri ĝia subpremado al la revoluciaj amasoj kaj ĝia politika persekutado kontraŭ mi. . .”

Tiu viro estas Ĝu Ginduo. De julio de 1973 ĝis aŭgusto de 1975, li skribis tri leterojn al Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio por malkaŝi la problemojn pri Ĝang Ĉunkiaŭ kaj Giang King.

Post la 9-a Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio en 1969, Ĝang Ĉunkiaŭ sin nomis “revolucia maldekstrulo” kaj kalumniis Kamaradon Ĉen Ji en iu televida parolado en Ŝanhajo. Tiam Ĝu Ginduo kaj multaj kamaradoj de la Jueĝju-opera Trupo jam opiniis ke la parolo de Ĝang Ĉunkiaŭ entenis ian kaŝitan intencon. Poste, kiam Kamarado Ĉen Ji forpasis, Prezidanto Maŭ persone partoprenis en la funebra ceremonio kio

kortuŝis ĉiujn. Sed Ĝang Ĉunkiaŭ kaj liaj sekvantoj ankoraŭ atakis Kamaradon Ĉen Ji dirante, ke “li nur povis verki poemaĉojn, ne lertis en militado kaj estis ĉiammalvenka generalo”; per tio li direktis sian lancpinton al Prezidanto Maŭ. Tio indignigis Ĝu Ginduo kaj aliajn. Ili aŭdis ankaŭ ke Ĝang Ĉunkiaŭ plurfoje atakis aliajn gvidantojn de la Centra Komitato de la Partio. Kion do li volis fari? Pri tio Ĝu Ginduo havis grandan dubon. En la batalo por malkaŝi kaj kritiki la kontraŭpartian klikon de Lin Biaŭ, Ĝu Ginduo pliapaŝe konis la komplikecon kaj intensecon de la batalo inter la du linioj en la Partio. Kune kun siaj kamaradoj li studis la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Praktiku Marksismon-Leninismen, kaj ne reviziismen; unuigu, kaj ne splitigu; estu malkaŝemaj kaj honestaj, kaj ne faru konspirojn kaj intrigojn”** kaj altigis singardemon al la agoj kaj paroloj de la “kvarpersona bando”. Ili havis dubon ankaŭ pri tio, ke la “kvarpersona bando” konstruas milicion en Ŝanhajo por kontraŭstari al la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Ĉu Prezidanto Maŭ scias kion ili faris? Ĝu Ginduo ekpensis pri la varma espero de Prezidanto Maŭ al la juna generacio kaj opiniis ke li devas raportti al Prezidanto Maŭ la opiniojn de li kaj liaj kamaradoj.



La 28-an de julio, 1973 li skribis la unuan leteron al Prezidanto Maŭ, en kiu li malkaŝis la atakon de Ĝang Ĉunkiaŭ al kamarado Ĉen Ji kaj aliaj gvidantoj de CK de KPC post la dorso de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio. La 3-an de aŭgusto, 1975 li refoje skribis leteron al Prezidanto Maŭ, en kiu li raportis siajn kvar opiniojn: 1. Ĝang Ĉunkiaŭ ne estas malkaŝema kaj honesta kompartiano, li estas enpartia baza elemento de Lin Biaŭ por la kapitalisma restaŭro. Nun li unue devas anatomii sin mem kaj prezenti sian mallumon en la penso al Prezidanto Maŭ kaj la Partio. Hodiaŭ, Prezidanto Maŭ estas ankoraŭ sana, kaj ankoraŭ estas bona ŝanco por ke li korektu la erarojn. Se li ne tiel agos, liaj agoj estos malutilaj al la Partio, la popolo kaj li mem; 2. Pri la organiza sistemo kaj ekipa stato de la ŝanhaja milicio oni devas raporti ne nur al la Centra Komitato de la Partio, sed ankaŭ detale informi al Prezidanto Maŭ kaj ĉiuj membroj de la Politika Buroo de CK de KPC. La gvida povo de la milicio devas senkondiĉe aparteni al la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ; 3. Iuj homoj lertas nomi malbonaĵon bonaĵo, ili trompas la gvidantojn kaj amasojn kaj “vidas pli malproksimen” ol Lin Biaŭ. Ili nun akumulas fortojn por levi ondojn post kiam Prezidanto Maŭ forpasos. Ni ne povas ne atenti tiujn “revoluciistojn” malutilajn al la revolucio; 4. La ĉiutaga vivo de Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ devas esti rigardata kiel granda afero por la tuta partio kaj la tuta popolo. Nur se ili ambaŭ vivas sane, niaj aferoj povas esti bone farataj. Ni devas ĉiumomente nin gardi kontraŭ “insidema homo” kaj atenti pri “neatenditaĵo”.

La 25-an de julio, 1975 Prezidanto Maŭ kritikis la “kvarpersonan bandon”, kiu strangolis la filmon “La Pioniroj”, montrante: **“Tiu ĉi filmo ne havas gravajn erarojn kaj mi propo-**



*Gu Ginduo indigne kondamnas la krimojn de la kontraŭpartia “kvarpersona bando”.*

**nas aprobi eldonon de ĝi. Ne postulu perfektecon. Estas eksceso atribui al ĝi dekon da eraroj, kaj tio malutilas al ĝustigo de la literatura kaj arta politiko en la Partio.”** La vortoj de Prezidanto Maŭ kiel hela lampo prilumis la koron de la literaturaj kaj artaj laborantoj. Li subtenis literaturajn kaj artajn laborantojn kaj severe kritikis Giang King kaj ŝian bandon. La kamaradoj de la Ŝanhaja Jueĝju-opera Trupo emocie studis kaj diskutis la instrukcion de Prezidanto Maŭ, ne plu timas esti akuzita pri atako al la “revolucia standardotenanto” kaj ekkritikis Giang King pri multaj problemoj. Tiunokte, Ĝu Ginduo kaj samloĝjano Zoŭ Gianĝong interparolis ĝis malfrua horo.

Kial verkoj kreitaj de literaturaj kaj artaj laborantoj sub la zorgo de Prezidanto Maŭ fariĝis fruktoj “tutkore kaj zorgeme kulturitaj” de iu homo? Kial iuj artaj trupoj ne permesis al artistoj profundigi en laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn kaj fermis ilin en domo por aparte “lertigi la arton”? Kial la revoluciaj amasoj laŭdis la filmon “La Pioniroj”, sed iu senskrupule atribuis al ĝi dekon da eraroj? Kial iuj freneze grandigis la burĝan rajton en artaj

rondoj, eĉ pli senbride ol antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio? La ĉefa radiko de ĉio ĉi tio estas Giang King tirane superreganta la artajn rondojn. Estas ŝi, kiu kontraŭstaras al la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ, subfosas la literaturajn kaj artajn principojn kaj politikojn de la Partio kaj splitas la revolucian literaturan kaj artan trupon. La instrukcio de Prezidanto Maŭ trafis la vundan lokon de Giang King kaj vigligis la batalon inter la du linioj en la literaturaj kaj artaj rondoj. Kial do Ĝang Ĉunkiaŭ kaj similaj laŭdis Giang King senskrupule kaj eĉ postulis ke la artaj kaj literaturaj laborantoj klopodu por glori ŝin? Ĉu en tio ne troviĝas intrigo? Ili estis maltrankvilaj pri la sorto de la ŝtato kaj la popolo post la forpaso de Prezidanto Maŭ.

La 26-an de aŭgusto, 1975 Ĝu Ginduo triafoje raportis al Prezidanto Maŭ siajn opiniojn pri Ĝang Ĉunkiaŭ kaj Giang King. En sia letero li skribis: "Prezidanto Maŭ, post informiĝo pri via instrukcio pri 'La Pioniroj' en la 23-a, mi pensis multe kaj havas unu demandon: Kial iuj ĉiam kantas himnon al Giang King? Kial ili laŭdis ŝin, kvazaŭ ŝi estus perfekta? Ĉu ili tiel agas pro sia respekto kaj amo al ŝi? Laŭ mi, ne. Probable ili havas kaŝitan intencon superregi la ŝtaton pere de ŝi. Eble mi nur senbaze timas pri la falo de la ĉielo. Sed multaj fenomenoj maltrankviligis min, ni ja devas konsideri pri la tagoj post la forpaso de Prezidanto Maŭ. Ni estas nova generacio kreskanta sub kulturado de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ, ni devas ĉiun momente nin gardi de restaŭro de kapitalismo kaj de regpotenco-uzurpado de reviziistoj, kaj absolute ne permesas, ke la afero komencita de la maljuna generacio perein en niaj manoj. Hodiaŭ vi ankoraŭ vivas sane, multaj aferoj povas esti bone aranĝitaj, ni amas la hodiaŭon kaj ankaŭ zorgas la morgaŭon." En la sama tago Ĝu Ginduo sendis aliajn 3 leterojn kun la sama enhavo al Ĉefministro Ĝoŭ kaj aliaj du gvidantoj. Sur ĉiu el la 6 leteroj li skribis sian nomon, la adreson kaj la laboran unuon. Ĉar li opiniis ke la skribado de leteroj al Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio por raportoj faktajn estas permesita de la partiaj disciplinoj kaj la ŝtata leĝo kaj li estas malkaŝema kaj honesta.

Iuj el liaj leteroj falis en la manojn de la "kvarpersona bando", pro tio Kamarado Ĝu Ginduo suferis kruelan politikan persekutadon de la bando kaj ĝiaj lakeoj. Ili arestis lin kaj praktikis al li faŝistan diktaturon. Ili perforte devigis lin konfesi ke liaj leteroj estas malica atako kontraŭ "gvidantoj de la Centra Komitato de la Partio" kaj prenis lin kontraŭrevoluciulo. Kaj krome ili faris al liaj konatoj rigoran ekzamenon.

Sed la karcero de la "kvarpersona bando" ne povis kateni la revolucian veron. En pli ol dek monatoj en la malliberejo, Ĝu Ginduo pli serioze studis verkojn de Prezidanto Maŭ. Kiam li legis artikolon de Prezidanto Maŭ pri kritikoj al Vang Ming kaj Ĝang Guotaŭ, li opiniis, ke Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj ilia bando tre similas al Vang Ming, Ĝang Guotaŭ kaj similaj. Ili **"ŝajnis sin marksistoj por timigi laboristajn kaj kamparanajn kadrojn"** kaj **"por timigi naviajn gejunulojn"**. Dank' al la instruo de Prezidanto Maŭ, Ĝu Ginduo pli klare vidis la reviziistan vizaĝon de Ĝang Ĉunkiaŭ kaj Giang King. Li firme kredis, ke fine venos la tago, en kiu tiaj "kontraŭrevoluciuloj kun falsa vizaĝo de revoluciulo" certe estos kondamnitaj de la popolo.

En la tagoj, kiam Ĝu Ginduo estis ekzamenata en karcero, la revoluciaj amasoj ĉiam subtenis kaj simpatiis lin kaj esprimis sian indignon kaj malkontenton pri la aresto de Ĝu Ginduo. Kvankam la kamaradoj de la Jueĝju-opera Trupo ne sciis kion li skribis en la leteroj, tamen ili kredis ke li ne faris kontraŭrevolucian aktivadon laŭ lia konduto en la pasinteco. La partia filio de la trupo kaj multaj laborantoj de la publika sekureca institucio opiniis ke oni ne devas rigardi Ĝu Ginduo kiel malamikon kaj devas liberigi lin frue.

Post la frakaso de la "kvarpersona bando", la popolo tre ĝojis. Ankaŭ Ĝu Ginduo estis liberigita el la kateno de la "kvarpersona bando". Li kaj liaj kamaradoj kune ĵetiĝis en novan batalon por malkaŝi kaj kritiki la krimojn de la "kvarpersona bando" pri uzurpo de la gvidanteco de la Partio kaj la ŝtato.

## RUGĜVARDIANO ĈEN DEHUJ

En julio de 1967, celante uzurpi la plej altan gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato, Giang King kaj ŝia bando elmetis la reakcian sloganon "ataki per rezonado kaj sin defendi per forto" por malordigi la tutan landon per incito de bataloj inter la amasoj. Ĝang Ĉunkiaŭ, Vang Hongven kaj aliaj tuj starigis en Ŝanhajo komandejon por "ataki per rezonado kaj sin defendi per forto" laŭ la slogano. Post nelonge, la slogano influis la tutan landon, serioze ĝenis kaj subfosis la Grandan Proletan Kulturajn Revolucion, kaj malhelpis produktadon. La vastaj popolamasoj vidis tiujn fiagojn de la "kvarpersona bando" kaj ĝin malamamis kore. Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ "batalu per rezonado kaj ne per forto", ruĝgardiano Ĉen Dehuj analizis la malican celon de Giang King en elmeto de tiu slogano, en ligo kun la fakto ke la revolucio kaj produktado de tiu loko suferis seriozan subfosadon pro la reakcia slogano.

Li unue skribis al la redakcio de ŝanhaja ĵurnalo, montrante ke la slogano estas kontraŭstara al la instrukcio de Prezidanto Maŭ, ne konforma al la rezolucio de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio pri la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj estas slogano subfosanta la grandan kulturajn revolucion. Li petis de la redakcio klarigon pri tio. Sed la redakcio tiam regata de la "kvarpersona bando" respondis, ke la slogano estas "revolucia kaj batala". Li skribis al du ĵurnalaj redakcioj de Pekino, sed ricevis nenian respondon. Poste li sinsekve skribis leterojn al la Grupo de la Kultura Revolucio de la Centra Komitato de KPC. Li diris en la letero de la 23-a de septembro, 1967: "Giang King, la ekstreme reakcia slogano 'ataki per rezonado kaj sin defendi per forto' elmetita de vi en akcepto de la reprezentantoj de la Henan-a Komunumo la Sepa de Februaro en la lasta tagdeko de julio . . . estas ne konforma al la penso de Prezidanto Maŭ. Ĝi estas ekstreme erara reakcia penso. Mi esperas ke vi publike konfesos vian eraron en ĵurnalo." "Vi devas repreni vian eraron diron. Se ne, via estonteco estos mizera."

En la letero de la 26-a de septembro 1967 Ĉen Dehuj pliapaŝe malkaŝis Giang King. Li skri-

bis: "Mi esperas ke vi publikigos artikolon en la Popola Ĵurnalo aŭ en la gazeto Ruĝa Flago por ekspliki vian sloganon por ke ni vidu ĉu ĝi estas prava aŭ ne. Se ne, ni prenos vin kiel ĉefon en instigo de batalo inter amasoj."

"Nun, kiu havas dubon pri parolo de iu respondeculo de la Grupo de Kultura Revolucio, tiu estas rigardata kiel atakanto al ĝi kaj kiel kontraŭrevoluciulo. Prezidanto Maŭ prave diris: '**Pri ĉiu ajn afero komunistoj devas demandi per kial, bone ĝin pripensi per sia propra cerbo, ĉu ĝi estas konforma al realo kaj vere prava; ili absolute ne devas sekvi ion blinde, nek stimuli sklavismon.**' Mi opinias, ke vi estas homo suspektinda kaj ne estas membro de la komandejo de Prezidanto Maŭ."

Ankaŭ sur la kovertoj de tiuj leteroj Ĉen Dehuj skribis siajn nomon kaj adreson. Ĉar li direktis sian lancpinton rekte al Giang King, li estis probable rigardata kiel kontraŭrevoluciulo. Instigate de la instrukcio de Prezidanto Maŭ al ruĝgardianoj "**Pravas ribelo kontraŭ la reakciuloj**" li timis nenian danĝeron. Li opiniis ke li estas fidela al la Partio kaj Prezidanto Maŭ kaj liaj agoj estas tute honestaj. Post elsendo de la leteroj, li parolis al neniu pri tio kaj montris sin serena, ĉar li firme kredis, ke li estas prava.

Per la povo en la manoj, la "kvarpersona bando" faris al Ĉen Dehuj kruelan politikan persekutadon. Ili rigardis la leterojn de Ĉen Dehuj "kontraŭrevoluciaj" kaj transsendis ilin al la Oficejo de Publika Sekureco de Jong-an-gubernio. Ili ordonis ke oni traktu lin kiel agantan kontraŭrevoluciulon. Je la 13-a de majo 1968 Ĉen Dehuj estis arestita, kaj li estis liberigita nur en la 9-a de julio 1973. En la karcero li firme kredis ke la afero konfuzita de la "kvarpersona bando" fine estos korektita kaj la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ liberigos lin politike en la estonteco.

Nun, post la frakaso de la "kvarpersona bando", la politika reputacio de Ĉen Dehuj estis restarigita. Li kun plena revolucia entuziasmo sin ĵetis en la amasan batalon por malkaŝi kaj kritiki la "kvarpersonan bandon".



# La Lernejo Ŝaŭŝan

Ŝaŭŝan estas la hejmloko de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong. La 25-an de junio, 1959, kiam Prezidanto Maŭ inspektis ĝin, li persone skribis al ĝia lernejo la nomon "La Lernejo Ŝaŭŝan". Ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio, observante la instruojn de Prezidanto Maŭ kaj daŭrigante la aferon postlasitan de la revoluciaj martiroj, la instruistoj kaj lernantoj de tiu lernejo diligente studas Marksismen-Leninismen-Maŭzedongpenson. Por plenumi la bezonon de la kampara socialisma konstruado, la lernejo starigis kursojn pri agrikultura tekniko, kampoflegado, mezurado kaj medicino, ĉiamaniere kombinante la teorion kun la praktiko. Direktate de la proleta eduka linio, nova generacio de klerigitaj daŭrigantoj de la proleta revolucia afero kun socialisma konscio estas en sana kreskado.

Atenta lernado





Instruistino rakontas al lernantoj pri la inspektado de Prezidanto Mañ al la lernejo





La laboristo rakontas al lernantoj de la kurso de agrikulturaj maŝinoj pri strukturo de agrikultura elektra motoro en la fabriko funkciigata de la lernejo.


Komunumanino Liu Hiuhua donas al lernantoj lecionon sur tritika kampo.







Lernantoj faras mezuradon por fundamenta konstruo de kampoj.



Maŭ Dikiu, la partifilia sekretario de Ŝaŭŝan-brigado (la unua de dekstre), rakontas al instruistoj kaj lernantoj pri revoluciaj aktivadoj de Prezidanto Maŭ en lia juneco.



# Sane Kreskas Antaŭaj Ruĝgvardianoj en Kamparo



Intelekta junulo Li Ĝengven helpas malriĉkamaranon en memklerigo.





Post la forpaso de Prezidanto Maŭ, diplomitoj de la altaj lernejoj de Hebej-provinco veturas al Tibeto por tie konstrui la landliman regionon, daŭrigante lian postlasitan aferon kaj turninte la malĝojon en forton.



Ruĝgardiano Li Kingjun (la dua de dekstre) siatempe revuita de Prezidanto Maŭ firme decidis kontribui sian forton al la sanprotektaj aferoj en la kamparo.

Kamaradino Ma Hehiang rakontas al la lernantoj siajn spertojn en kamparo.



Kamaradino Hiaŭ Ĝeng fiksloĝiĝis en kamparon jam ok jarojn kaj estas glorie nomata bona daŭriganto de la revolucio.





## Ĉuhiong hodiaŭ

ĈUHIONG de Junnan-provinco ĉe la sud-okcidenta landlimo de Ĉinio estas loko kie loĝas 20 ĉinaj naciecoj inkluzive de ji-oj, huj-oj, tibetanoj, mjaŭ-oj, lisu-oj, ĝŭang-oj, nu-oj, drung-oj kaj taj-oj, inter kiuj la ji-oj nombras pli ol 400,000 homojn. Ĝi estas unu el la lokoj, en kiuj plej koncentre loĝas ji-oj de Ĉinio.

Ĉuhiong estas bela kaj riĉa montregiono. En la pasinteco la diversnaciecaj popolanoj suferis de generacio al generacio kruelajn subpremadon kaj ekspluatadon de feŭdaj dinastioj kaj sklavmastroj kaj baraktis en malluma kaj mizera abismo. En aprilo de 1958, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ tie efektiviĝis demokratia reformo kaj fondiĝis la Ĉuhiong-a Ji-nacieca Aŭtonoma Subprovinco. La diversnaciecaj popolanoj de Ĉuhiong disrompis katenon de la feŭda kaj sklava sistemoj kaj fariĝis mastroj de la ŝtato.

Prenante Daĝaj kiel sian ekzemplon la Ĉuhiong-anoj energie klopodis por reformi la naturon, praktiki sciencan terkulturadon kaj samtempe disvolvi agrikulturon, forstokulturon, brutobredadon kaj flankokupojn. Ili fondis lokan industrion kaj rapide progresigis kulturan, edukon, sanprotektan, trafikan kaj aliajn aferojn. La loko multe produktas lignojn, brutoproduktaĵojn, nuksojn, kaŝtanojn, kanabon, teon, mielon, fruktojn, drogojn, felojn kaj diversajn metalajn minojn.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio la "kvarpersona bando" kreis ĥaoson en multaj lokoj kaj unuoj de la tuta lando por uzurpi gvidantecon kaj restaŭri kapitalismon. Ankaŭ

Junnan-provinco kaj Ĉuhiong estis multe ĝenitaj de tio. La obstinaj kunuloj de la "kvarpersona bando" en tiu loko laŭplaĉe renversis la rilaton inter ni kaj la malamikoj kaj tiun interne de la popolo kaj prenis gvidantojn de la subprovinco kaj gubernioj kiel "enpartiajn potenc-tenantojn irantajn la kapitalisman vojon", "perfidulojn" kaj "kapitulacistojn". Ili subpremis diversnaciecajn popolamasojn, opiniante, ke la lastaj estas akirintoj de profitoj kaj konservativaj fortoj. Ili levis en 7 el la 11 gubernioj de la tuta subprovinco seriozan batalon inter amasoj. Ili kreis splitiĝon en fabrikoj kaj distrustumpetis privatan mastrumadon de agroj en kamparo. Profitante la ŝancon, bienuloj, kulkaj, kontraŭrevoluciuloj, fiuloj kaj dekstruloj faris subfosadon. En iuj komunumoj kaj brigadoj inunditaj de kapitalismo, laborfortoj forfluis eksteren, privatuloj okupis kolektivajn agraron, hakis kolektivajn arbojn, kaj akute malaltiĝis la industria kaj agrikultura produktado. Ekzemple, la produktokvanto de greno de la tuta subprovinco en 1976 reduktiĝis je pli ol 10% kompare kun tiu de 1975, la totala produktov valoro de ĝia industrio reduktiĝis je 18% kompare kun tiu de 1975, kaj la tri malgrandaj fabrikoj de nitrogena sterko de la subprovinco plenumis nur 6.4% de la plano.

En la mallonga tempo de kelkaj monatoj post la frakaso de la "kvarpersona bando" multe ŝanĝiĝis la fizionomio de Ĉuhiong. Nun arde iras la movado de malkovro kaj kritiko al la "kvarpersona bando" en la tuta subprovinco, la longe subpremita revolucia aktiveco de la amasoj elŝpruciĝis, kaj aperis alta tajdo de socialisma konstruado. La amasaj movadoj de



lerno de Daking en industrio kaj lerno de Daĝaj en agrikulturo ĉiam pliprogresas kaj la produktovaloro de industrio plialtiĝas en ĉiu monato, ekzemple, la produktovaloro de industrio en marto de 1977 pliiĝis je 32% kompare kun tiu de februaro kaj tiu de aprilo pliiĝis je 10.6% kompare kun tiu de marto, kaj en la kamparo pli ol 90% de laborkapabluloj partoprenis en kolektiva produktado.

Kial la loko povas havigi al si tian bonan situacion en tiel mallonga tempo? La ŝlosila kaŭzo kuŝas en tio, ke la partia komitato de la subprovinco firme kondukis la batalon kontraŭ la "kvarpersona bando". En la komenco post la frakaso de la "kvarpersona bando" iuj el la partia komitato de Junnan-provinco provis subpremi la amasojn por ke la lastaj ne malkaŝu krimojn de la "kvarpersona bando". Ankaŭ iu obstina kunulo de la "kvarpersona bando" venis al Ĉuhiong kaj minacis la partian komitaton por regi la situacion de tiu loko. Tamen la partia komitato de la subprovinco Ĉuhiong firme forpuŝis la malhelpon. La membroj de la partia komitato profundigis inter amasojn kaj donis ekzemplon en la malkovro kaj kritiko al krimoj de la "kvarpersona bando" kaj fiuloj. Ili vaste mobilizis amasojn kaj okazigis en la subprovinco plurajn mitingojn kun po dek mil partoprenantoj kaj multajn mezajn kaj malgrandajn kunvenojn por kritiki ilin, kio multe klarigis la okulojn de la amasoj kaj metis bazon por disvolvi la revolucian situacion de Ĉuhiong. Krome ili organizis reprezentantojn de la amasoj por viziti fabrikon, kiu longe ĉesis produkti pro serioza malhelpo de la "kvarpersona bando" por ke ili komprenu, ke se oni ne kondukos ĝis la fino la batalon kontraŭ la "kvarpersona bando", ne nur ne povos progresi la produktado, sed eĉ aperos granda regreso. La kadroj kaj amasoj de tiu fabriko decidis regajni la perditajn kaŭzitaĵojn de la "kvarpersona bando". La Ĉuhiong-a Silka Fabriko estas malgranda fabriko kun pli ol 500 homoj. Pro detruo de la "kvarpersona bando" kaj iliaj kunuloj la laboristoj de la fabriko disiĝis en tri skolojn, kio serioze malhelpis la produktadon. Nun en la batalo kontraŭ la "kvarpersona bando" ili efek-

tivigis grandan unuiĝon, denove ekfunkciigis la longe neturniĝantajn maŝinojn kaj bonorde faras la produktan laboron.

En la profunda malkovro kaj kritiko al la "kvarpersona bando" la partia komitato de la subprovinco firme apogas sin sur la vastaj amasoj de laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj tre atentis la konstruadon de ilia spina vicaro. En 1976 Longŝan-brigado de Juanmoŭ-gubernio multe suferis de la "kvarpersona bando" kaj iliaj obstinaj kunuloj. Tamen neniu el la 63 partianoj de la brigado ŝanceliĝis. Ili unuiĝis kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por bojkoti ilian malbonan influon kaj akiris riĉan rikolton de greno, kotono, oledonaj semoj kaj sukerkanoj, kaj la hektara produktokvanto de greno superis 7,500 kilogramojn. La partia komitato de la subprovinco opinias, ke nur se oni konstruos, same kiel Longŝan, vicarojn kun laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj membroj de la Partio kaj la Komunisma Junulara Ligo kiel spino, oni povos vere efektivigi la diktaturon de la proletaro en la bazaj unuoj. Ili alvokis diversnivelajn partiajn komitatojn de la subprovinco lerni la specon de Longŝan kaj okazigis kunvenon de la reprezentantoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en ĉiuj komunumoj por pliapaŝa konstruado de tia spina vicaro. La partia komitato de la subprovinco ankaŭ aplikis efikan metodon por bremsi kapitalisman tendencon kaj sendis laborgrupojn konsistantajn el 4,500 homoj al la kamparo por disvolvi movadon de reĝustigo de laborstilo. Dank' al tio plifirmiĝis la ĉiunivelaj gvidantaroj de la subprovinco, pligrandiĝis la spinaj vicaroj de laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj rapide mobiliziĝis la socialisma aktiveco de la popolamaso. La rimarkinda atingo de Ĉuhiong pruvis la antaŭdiron de Prezidanto Hua Guofeng en la Dua Tutlanda Konferenco pri Lerno de Daĝaj en Agrikulturo okazinta je la fino de 1976: "1977 estos jaro de reordigo de la lando post la frakaso de la 'kvarpersona bando' kaj jaro de antaŭenmarŝo en unuiĝo kaj venko." Ĉuhiong estas ekzemplo pri tio.

# Mastroj de Daking-olekampo

de VANG ĈUAN

**E**N Daking-olekampo oni povas vidi, ke la putobudoj estas en bona ordo, la ekipaĵoj pure viŝitaj kaj la staplejoj bone mastrumataj. La laboristoj povas rapide kaj ĝuste respondi demandojn de vizitantoj. Ĉio ĉi tio montras, ke la laboristoj de Daking estas tre konsciencaj, kaj ke ili estas veraj mastroj de la olekampo.


## MIRINDAJ DEMONSTROJ


La reprezentantoj partoprenintaj en la Tutlanda Konferenco pri Lerno de Daking en

Industrio rigardis en Daking multajn mirindajn demonstrojn, kiujn la laboristoj de Daking nomas “teknikaj ekzercoj”.

Iutage, sur demonstrejo 20 petrolkolektistoj de la unua petrolkolekta sekcio, kun meznombra aĝo de 24 jaroj, flue kaj senerare respondis la demandojn de vizitantoj pri geologia stato, petrolkolekta tekniko, fundamentaj donitajoj de la oleputoj kaj akvoputoj mastrumataj de ili kaj pri eventualaj nenormalaj fenomenoj en petrolkolektado, kaj fojfoje vekis varman man-

*Vicĉefministro Ĉen Jonggij inspektas la flikejon.*





*Laboristino de akvopumpa stacio zorge flegas ekipajon.*

klakadon. Estrinoj de petrolkolektaj putoj Hju Mejjin kaj Tu Bifang respondis en nur du minutoj multajn demandojn pri analizo, determino kaj trakto de akcidentoj de oleputo kaj akvo-puto kaj estis admirataj de la spektantoj.

Aŭtoj ofte kuras inter senŝoseaj putoborejoj por subputaj laboroj. Por glate plenumi sian laboron, la ŝoforoj ĉiuj povas lertege ŝanĝi internan pneŭmatikon de aŭtorado. Dek junaj ŝoforinoj faris jenan demonstron: Ili alrulis po unu aŭtoradon je 115 kg. pezan kaj je 1.1 metroj altan. Kiam la komandanto signalis per fajfilo, ili vivecplene eklaboris kun du feraj levstangoj, per kiuj ili elprenis la ŝtalan fiksringon, demetis la radringon, ŝanĝis la internan pneŭmatikon kaj denove muntis la ŝtalan fiksringon kaj radringon. Jen ŝoforino Ĝaŭ Lina levis sian manon kaj raportis: "Finite." Kaj la ceteraj naŭ ŝoforinoj raportis plenumon de sia laboro unuj post aliaj. La juĝisto anoncis al la rigardantoj: "Ĝaŭ Lina uzis nur 58 sekun-

dojn por ŝanĝi la internan pneŭmatikon de unu rado." Tiam ektondris manklakado.

Ankaŭ dek administrantoj de la staplejo faris demonstron pri parkera scio pri la tenataj artikoloj, elpreno de iu ajn el ili kun kovritaj okuloj kaj elpreno de postulata kvanto da materialo sen uzo de pesilo.

Tio rezultas el diligentaj lernado kaj ekzerco. En multaj unuoj de Daking troviĝas ekzercejo kaj ofte okazas kunveno por ekzameni laboristojn pri ilia teknika lerteco.

## **SUR LA REVOLUCIA LABORPOSTENO**

Dum vizitado en Daking, vi povas vidi laboran regularon pendantan sur muro ĉu en laborejo kaj konstruejo, aŭ ĉe putobora taĉmento kaj oleputo. Ĝia enhavo estas ne difinita de la superaj instancoj, sed elmetita de laboristoj laŭ ilia bezono en praktika laboro.

La laboristoj de la Norda Dua Akvopumpa Stacio de la Unua Petrolkolekta Sekcio persiste sin reglamentas dum 15 jaroj. La stacio ekfunkciis en aprilo de 1962. Ĝia tasko estas enpumpi akvon en oleputojn per altpremaj pumpiloj por teni la olestratuman premforton kaj efektiviĝi altan kaj stabilan produktadon. Por bone plenumi tiun taskon, la laboristoj de la stacio ellaboris regularon laŭ la principo de partoprenado de laboristoj en administrado de entrepreno, difinita de la "Ĉarto de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio". En sia inspektado de Daking en junio de 1962, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj venis al la stacio. Vidinte ke ĉiu laboristo konsciencie sin reglamentas en sia laboro li varme laŭdis ilin kaj plene jesis pri tio. Tio multe kuraĝigis la laboristojn.

Dum la pasintaj 15 jaroj, ĉiuj ekipaĵoj kaj maŝinoj de la tuta stacio ĉiam estis brile viŝitaj, sendifektaj, bone funkciaj kaj plene utiligitaj. Neniu el la 26 instrumentoj ricevitaj en la komenca periodo estas perdita. Eĉ en senluma nokto la laboristoj povas facile trovi bezonatajn instrumentojn. En speciala ŝranko bone konservataj estas 1,006,000 donitaĵoj registritaj dum la pasintaj 15 jaroj de la stacio



kaj aliaj dokumentoj. Al tiu stacio okazis nenia akcidento de post ĝia fondiĝo.

Respondeculo de la stacio rakontis al vizitantoj anekdoton pri "8 minutoj". Ĝi temas pri okazaĵo ĉe la unua pumpilo. De la ekfunkcio de la pumpilo la registrita nombro de ĝia funkcia tempo finiĝas per "8 minutoj" kaj tiam oni volis forviŝi tion, sed laboristoj diris ke kvankam la "8 minutoj" estas ĝenaj en la registrado, tio tamen spegulas la efektivan stacion, kaj oni devas rigore observi la regularon, eĉ sen eraro de unu sekundo. Nun jam deĵoris pli ol 13,000 skipoj, sed ili perdis neniun registron; kaj la maŝino jam iris entute pli ol 82,000 horojn, sed la registra nombro ankoraŭ finiĝas per "8 minutoj".

Iuj laŭdindaj aferoj okazis fakte ekster la limo de la regularo pro la devoscio de laboristoj. Ekzemple, post finiĝo de sia deĵoro laboristino Vang Gujhia iris hejmen. Kiam ŝi atingis la pordon de la hejmo, subite venis en ŝian kapon la ideo ke lastatempe multe ŝanĝiĝis la akvokvalito kaj la deĵoranta laboristino estas ne lerta en akvoanalizo; se ŝi ne bone farus analizon, kaj nenormala akvo estus pumpita en la

olestratumon, tio malutilus al la alta kaj stabila produktado de la olekampo. Tion pensante ŝi tuj sin turnis al la pumpstacio por helpi la deĵorantinon en preno de akvospecimeno, akvoanalizo, kaj lernado de tekniko. Pensante



*Ki Lili (la dua de dekstre), laborantino de la staplejo de Daking*



*Daking-aj veldistoj en konkurso pri veldado*

ke Vang Gujhia jam finis sian deĵoron kaj ŝi havas infanon en la hejmo, la deĵorantino plurfoje admonis ŝin hejmenreveni. Vang Gujhia diris: "Ni estas mastroj de la olekampo kaj ĉiun laboron de la stacio ni devas prizorgi; kvankam mi finis la deĵoron, tamen mi ne povas forgesi mian laborpostenon!" Ŝi laboris senripoze 18 horojn.

### ŜPAREMO DE LA FLIKEJO

Sur la vasta olekampo oni tre malofte vidas amasojn de eluzitajoj flanke de la vojoj, ĉar ili estas plene utiligitaj. En Daking troviĝas flikejo, kiu tre kortuŝas la vizitantojn per sia ŝparemo.

En la komenco de la olekampa konstruado la flikejo estis nur flika grupo el kelkaj malmobilizitaj soldatoj kaj familianoj de laboristoj, instalita en brika dometo por lavi kaj fliki malnovajn laborvestojn. Nun ĝi jam havas kvin domojn kun 415 laborantoj kaj 160 maŝinoj. Sed ĝia ĉefa tasko ankoraŭ estas fari la laborvestojn, peltajn kapvestojn kaj gantojn k. s. el malnovaj materialoj. Ekzamenante novan vatitan veston vi povas trovi ke ĝia substofa estas kunkudrita el multaj pecoj da purigita malnova ŝtofo. En la pasintaj 16 jaroj oni ŝparis por la ŝtato 920,000 metrojn da ŝtofo kaj grandan kvanton da aliaj materialoj.

Oni malkudris peltpecojn de malnovaj ĉapoj kaj faris peltveŝtojn el ili kun nova ŝtofo. Kial ili tiel faras? Iufoje ili flikis laborvestojn por laboristoj ĉe putoborejo kaj vidis, ke laboristoj laboras sur ŝaktoskafaldo pli ol 20 metrojn alta en neĝblovo; kaj dum laborado estas maloportune por ili porti peltan surtuton kaj ne sufiĉe varme porti vatitan jakon. Reveninte ili diskutis kaj venis al ili bona ideo: fari veŝtojn el malnovaj peltaj ĉapoj. Ili jam faris pli ol 17,000 tiajn veŝtojn, kiuj estas tre bonvenaj al laboristoj.


Ili utiligas ankaŭ la ĉifonojn. Laboristoj pensis: se kotonon povas fariĝi tolo, kial ni ne povas kotonigi tolĉifonon? Sekve ili faris kotonon el tolĉifonoj. En 1970, ili faris pli ol 300,000 parojn da vatitaj gantoj el pli ol 45,000 kilogramoj da tia kotonon. Krome ili ankaŭ

faris el eluzitaj pluvmanteloj antaŭtukojn kaj kontraŭpolvajn ĉapojn por ŝarĝistoj kaj konstruistoj, ŝuokovrilojn por veldistoj kaj kudril-saketojn por eksterdomaj laboristoj. Ili estas tiel ŝparemaj ke ili ne lasas perdi eĉ kudrilon kaj tajloran paŝtelon.

En la pasintaj dekkelkaj jaroj, la flikejo ĉiam estis ŝparema kaj ĝia spirito estis multe laŭdata kaj diskonigita. La ŝparemo de la flikejo kiel reprezentanto de Daking estas unu el la tradicioj de la tuta olekampo. Kial oni tiel agas? Flikistoj diris: "De kie venas mono por konstrui nian landon? Ni ne povas rabi aliajn kiel imperiismaj landoj, nek almozpeti de ili, ni povas nur kiel eble plej multe produkti kaj ŝpari."

En Daking estas multaj kortuŝaj ekzemploj pri la veraj mastroj de la olekampo. Dum la pasintaj 17 jaroj, la kaŭzo, ke Daking-olekampo povis disvolviĝi kun pliprodukto de nafto je 28 procentoj en ĉiu jaro, kaj en relative mallonga tempo povis konstruiĝi moderna petrolkemia uzino kaj nova socialisma minejo de kombino de laboristoj kun kamparanoj kaj kombino de urbo kun kamparo, ja kuŝas en tio, ke ĝi havas produktan armeon konsistantan el tiuj, kiuj sin liberigis de ekspluatado kaj subpremado, armis sin per Maŭzedongpenso kaj laboris kiel mastroj. Ĉian ajn miraklon ili ja povas krei!

*Olekolektistinoj persistas en ekzamenado de ŝtala draĵo uzata por forigi vakson.*





de KUANG HONG

**E**N la Tutlanda Ekspozicio pri Lerno de Daking en Industrio en Pekino montriĝas arĝenta ŝildo, kiu tre interesas vizitantojn. Ĝi surhavas ĉizitan tekston en la angla lingvo signifantan: "Profundan dankon al la trenŝipo 'Kantona Savo 201' pro ĝia savado de la membroj de la trenŝipo 'Oriento 3 de Bankoko' el danĝero ĉe la rifaro Langhua de Hiŝa-insularo, en la 21-a de decembro, 1975." Sube de la teksto estas gravuritaj la nomoj de la savita tajlanda ŝipanaro.

Tiu ŝildo enhavis amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Tajlando kaj registris bravan savadon faritan de kantonaj marsavaj laboristoj batalantaj sur la Suda Ĉina Maro.

La rifaro Langhua de nia Hiŝa-insularo longas je 10 marmejloj kaj larĝas je 3-4 marmejloj. Dum la fluso ĝi kaŝiĝas en akvo, kaj post tio ĝi elstariĝas denove. Kiam ŝtormo atakas, ondoj muĝante leviĝas alte en la ĉielon. Tiam, se preterpasanta oceana ŝipo en la malica marfluo ne estus direktata kun plena zorgo, ĝi frapiĝus kontraŭ la rifaro.

En la 17-a de decembro, 1975, blovis naŭgrada ventego sur la maro de Hiŝa-insularo. La tajlanda trenŝipo "Oriento 3 de Bankoko" deviis de sia naviga vojo kaj estis puŝata de ŝtormo kaj kolosaj ondoj sur la rifaron Langhua. En profunda nokto la marsava departemento de Kantono ricevis helpvokan signalon

kaj tuj tien sendis marsavajn taĉmenton kaj trenŝipon "Kantona Savo 201" tra la buŝo de la Perlo-rivero.

En tiu tempo la ĉina trenŝipo faris kelkajn klopodojn, sed ne sukcesis alproksimiĝi al la rifaro, kiu muĝis kvazaŭ kolerigita sovaĝa besto. La partia filio de la ŝipo decidis organizi sturman grupon kaj sendi ĝin sur la rifaron per savboato por unue savi la ŝipanojn. Tiu tasko estis kaj glora kaj danĝera. Respondeculo de la marsava departemento Gong Hing kaj ŝipestro Liu Ĉeng senhezite ekveturis al la rifaro kune kun siaj kvin grupanoj kaj du lokaj fiŝistoj.

La savboato trairis ondegojn, evitis rifojn post rifo kaj estis jam en distanco de nur 80 metroj de la tajlanda ŝipo, sed estis repuŝita de returnaj ondegoj. Tiam falis nokta kurteno. La boato haltis en danĝera kaj komplika loko de la maro kaj povis droni en ĉiu ajn momento. Sed, pensante pri minaco de morto al la tajlandaj ŝipanoj la grupanoj decidis ankri ĉeloke por helpi je ebla momento, lernante la revolucionan spiriton de Daking-anoj timi nek penadon nek morton. En tiu nokto ili obstine batalis 11 horojn kontraŭ ŝtormo, ondegoj kaj malvarma pluvo.

Je la tagiĝo de la sekvinta tago ŝipestro Liu Ĉeng skribis konsolan leteron en la angla lingvo al la tajlandaj ŝipanoj, kaj juna ŝipano Huang Juguang volonte prenis sur sin la taskon naĝe



ĝin sendi. Vidante la ĉinan ŝipanon kaj malfermite la amikan leteron, la tajlandaj ŝipanoj, kiuj jam neniom manĝis kaj trinkis dum du tagoj, ekhuras de emociiĝo. Antaŭtagmeze de tiu tago, profitante mallongan malfluson la savtaĉmentanoj sekure translokis la tutan tajlandan ŝiparon kaj iliajn pakajojn sur la trenŝipon "Kantona Savo 201".

Tuj post kiam oni savis la tajlandajn maristojn, la ĉina ŝipo ricevis urĝan helpopetan signalon elsenditan de la panama varŝipo "Maria" sur la maro de nia Nansĝaŝoŭ. Tiu ŝipo suferis de atako de forta ventego kaj martajdo kaj ĵetiĝis sur tute nudan rifaron. Anstataŭ iom ripozi la ĉina ŝipo tuj rapidis al la akcidenta loko.


En la danĝerplena momento gvidantoj de la ĉina ŝipo Ĝong Hing kaj Liu Ĉeng decidis persone iri tien. Sub ilia gvido la savtaĉmentanoj trairis rifojn kaj kondukis ĉiujn maristojn de "Maria" sur sian savboaton. Vidinte ke iu maristo de la panama ŝipo perdis siajn ŝuojn kaj iris malfacile sur rifo, ĉina juna savisto Jang Sujmin senhezite demetis siajn ŝuojn kaj donis ilin al li. Sed la ĉina junulo devis nudpiede iri sur koral-rokoj, kiuj pikvundis liajn piedojn kaj lia sango makulis ilin. Vidinte tion, eksterlandaj maristoj larmis de kortuŝiĝo.

Post zorga enketado kaj aranĝado la marsava ŝipo sekure tiris la tajlandan kaj panaman ŝipojn el la danĝero per vinĉo kaj transdonis ilin al la mastroj.

Post sia fondiĝo en 1957 tiu marsava taĉmento de suda Ĉinio ĉiam bone plenumis siajn taskojn kun la spirito "doni la esperon vivi al aliaj kaj restigi mortodanĝeron ĉe si mem". Dum la pasintaj 20 jaroj ĝi savis kaj elakvigis pli ol 250 ŝipojn en riveroj kaj sur maro, inkluzive de 50 ŝipoj de pli ol 20 landoj, inter kiuj estis Japanio, Britio, Grekio, Aŭstralio, Kubo kaj Somalio.

Tiu taĉmento trovis nombron da bonaj metodoj en praktika savado kaj plenumis multajn malfacilajn taskojn.

Iufoje la okmil-tonela ŝipo "Ginhua" de Singaporo estis puŝita de potenca tajfuno sur ŝtondigon je pli ol 1.800 metroj for de la naviga



*Maristoj de nia savŝipo eldanĝerigis ciprajn ŝipanojn ĉe la ĉina Hiŝa-insularo.*

vojo. Kiam la taĉmento atingis la lokon, la ŝipestro de "Ginhua" diris: La ŝipo povos eldanĝeriĝi, nur se oni fosos larĝan kaj profundan navigan vojdon kaj poste alsendos almenaŭ dek trenŝipojn kun po 5,000 ĉevalpovoj. Vidinte la alvenintajn 20-ĉevalpovan boaton kaj 300-tonelan bargon, la singapora ĉefmaato ne kredis, ke la ĉina taĉmento povos eltiri ilian ŝipon. Li opiniis, ke uzante tiajn ekipaĵojn oni bezonos almenaŭ tri jarojn por plenumi la taskon.

La marsava taĉmento havis sian apartan planon. Taĉmentestro Guo Hilaŭ kaj spertoriĉaj veteranaj laboristoj ripetade studis la proksiman meteoprognozon kaj geografian staton de la loko kaj faris specifan savprojekton. En la proksimaj tagoj estis okazonta forta tajfuno. Kvankam tio estis malbona afero, tamen ili decidis utiligi la grandan tajdon levitan de la tajfuno por eltiri la singaporan ŝipon. Proksime de la ŝipo staras kelkaj rifrokoj. Ili estas malamikoj por ŝipoj en navigado, tamen ili povas servi kiel

fostoj por ligi ŝtalkingblojn por eltiri la endanĝerigitan ŝipon. Ili diris, ke laŭ la filozofia penso de Prezidanto Maŭ oni devas krei kondiĉojn por turni malfavorajn elementojn en favorajn por sukcesigi la tiradon. En pli ol 20 tagoj ili zorgeme faris preparajn laborojn kaj atendis alvenon de tajfuno.

Ekblovis tajfuno. En tiu nokto freneze hurulis ventego kaj muĝis ondegoj; la ŝipoj proksimaj al la bordo jam fuĝis en havenojn. La taĉmentanoj tamen brave komencis malfacilan batalon kontraŭ vento kaj ondegoj. Je la ordono ekfunkciis ĉiuj tirmaŝinoj. La ŝipo "Ginhua" glate moviĝis laŭ la difinita linio: ĝi forlasis la ŝtandigon, trairis malprofundajon je 1,800 metroj longan kaj fine revenis sekure en la navigan vojon.

La tuta savado daŭris nur 29 tagojn, kaj tio forte mirigis la ŝipestron kaj ĉefmaaton de "Ginhua". Por esprimi sian dankon la ŝipestro proponis donaci silkflagon al la taĉmento, regali ĉiujn ĉinajn savtaĉmentanojn per manĝo kaj surŝipe eksplodigi petardojn por gratuli la sukceson. Sed ili respondis, ke savado de eksterlandaj endanĝerigitaj ŝipoj estas ilia internaciisma devo, tial ili konsentis nur la lastan dankesprimon. Fine la singapora ŝipestro ordonis, ke oni pendigu petardojn sur la ŝipo, kaj li mem ekbruligis ilin. En aklamado kaj sonado de petardoj la ŝipo "Ginhua" levis la ankrojn kaj malrapide forveturis.

Dufoje la trenŝipo "Kantona Savo 201" kaj la marsava taĉmento kune plenumis malfacilan trenan taskon. En la lastaj decembro kaj aprilo ili navigis pli ol 1,000 marmejlojn trenante

drilmaŝinajn platformojn "Suda Maro 1" kaj "Prospektoro 2" tra la Ĉina Suda Maro, venkinte ŝtormon kaj ondegojn. La du platformoj longas kaj larĝas po 64.6 metroj, iliaj tri fostoj altas po 127.2 metroj kaj ilia kontraŭventa areo atingis po 3,100 kvadratajn metrojn.

Tiu Ferulo-tipa marsava taĉmento kreskadas en ŝtormo kaj ondegoj, faris sian kontribuon en nia marsava afero, garantiado de glata navigado kaj pliigo de amikeco inter la ĉina kaj alilandaj popoloj, kaj pro tio ricevis multajn laŭdojn. La taĉmento plurfoje estas elektita kiel avangarda unuo de lerno de Daking en industrio, kaj ĉijare ĝia reprezentanto glorie ĉeestis la gravan Tutlandan Konferencon pri lerno de Daking en Industrio.



*Kadro kaj laboristo faras savadon.*

*Ŝipanoj de la taja trenŝipo "Oriento 3 de Bankoko" adiaŭas la ŝipestron kaj ŝipanojn de "Kantona Savo 201".*



KI FANG kaj ZENG MING:

# Maljuna ĉinmedicina kuracisto Ĝaŭ Bingnan



*Gaŭ Bingnan*

**K**ADRO kun malsana dekstra kruro venis al la Pekina Ĉinmedicina Hospitalo por peti helpon de kuracisto Ĝaŭ Bingnan. Lia kruro estis vundita en la Liberiĝa Milito antaŭ pli ol 30 jaroj. Tiam oni faris al li operacion por elpreni fragmentojn de bombo, sed la vundo kaj ĝia interna parto estis infektitaj kaj la vundo ne povis bone kalusiĝi. Nun denove ulceriĝis la vundo kaj iuj kuracistoj proponis amputi al li la kruron. Sed tio kripligos lin. Kiel li deziregas konservi la kruron. Kun espero li vizitis kuraciston Ĝaŭ Bingnan. D-ro Ĝaŭ Bingnan faris detalan ekzamenon kaj preskribis al li glutan medikamenton kaj plastron. Post ĉ. 5 monatoj, el lia vundo eliĝis tri fragmentoj de mortinta ostoj, en la vundo elkreskis nova karno kaj poste tute kalusiĝis la vundo, kaj la paciento jam povas facile iri.

Tiun kazon pritraktitan de D-ro Ĝaŭ Bingnan oni konigis al ni en la Pekina Ĉinmedicina Hospitalo. Iun tagon ni vizitis tiun faman kuraciston.

## MALSAMAJ SORTOJ EN MALSAMAJ SOCIOJ

Ĝaŭ Bingnan havas la aĝon de 78 jaroj. Kvankam griziĝis lia hararo, tamen la brilaj okuloj impresas per energipleneco. Tiu huj-nacieca doktoro spertis la reakcian regadon de Kingdinastio kaj Kuomintango kaj la vivon en la nova Ĉinio. Li rakontis al ni pri siaj tute malsamaj travivaĵoj en la malsamaj socioj.

D-ro Ĝaŭ Bingnan devenis de kukista familio. En la aĝo de 14 jaroj li eklaboris kiel lernoknabo

en iu privata kuracejo. Ĉiutage li devis labori 20 horojn. Foje li estis preparanta unĝventon. Li kirladis la molajon en dormemo kaj subite la mano trempigis en la bolantan kaldronon. Tuj la haŭto de la tuta mano defalis pro la brogo. En neretenebla dolorego li prenis kelke da kamfora medikamento kaj ŝutis ĝin sur la vundon, sed la mastro tuj deprenis la medikamenton, kaj lin batis kaj insultis.

Post plurjara studo Ĝaŭ Bingnan fine lernis iom da kuracarto. Iun jaron, la reakcia registaro faris ekzamenon al ĉinmedicinaj kuracistoj. El miloj da ekzameniĝantoj nur 13 sukcesis. Ankaŭ Ĝaŭ Bingnan sukcesis en tio, sed li akiris nur legitimilon de "helpkuracisto" kaj rajtis kuraci nur en antaŭurbo. Post kelkaj jaroj li ekpovis kuraci en urbo post trapaso de refoja ekzameno. Kvankam antaŭ la Liberiĝo li jam fariĝis fama kuracisto en la tuta Pekino, tamen li restis "helpkuracisto" nominale.

Poste Ĝaŭ Bingnan sukcesis fondi sian malgrandan kuracejon. Sub la obskura regado de Kuomintango, apaĉoj kaj kanajloj ofte venis ĉikani kaj ĉantaĝi lin, cetere senĉese altiĝis la prezoj kaj Ĝaŭ Bingnan vivis sengarantie.

En tiu tempo Ĝaŭ Bingnan tute malesperiĝis, sentis sin tre maljuna estante nur malpli-ol-50-jara kaj iris kun helpo de bastono.

En 1949, tuj post la liberiĝo de Pekino, la popola registaro donis al Ĝaŭ Bingnan legitimilon de ĉinmedicina kuracisto. Poste li eklaboris en popola hospitalo.



Parolante pri tio, li plilaŭtigis sian voĉon. Li ĝoje diris: “Post la Liberiĝo la Kompartio donis grandan atenton al la ĉina medicino, difinis politikon pri ĉinmedicinaj kuracistoj kaj la principon pri kombino de ĉina kaj okcidenta medicinoj. En tio ni vidis vastan perspektivon. Kiam ni informiĝis, ke la ŝtato establos ĉinmedicinan hospitalon, ni sentis ekstreman ĝojon. Mi donacis al la popola hospitalo ĉiujn miajn drogŝrankojn, medicinajn kaj farmakologiajn librojn k.a. Al la hospitalo venis labori multaj famaj maljunaj ĉinmedicinaj kuracistoj. La gvidantoj de la hospitalo tre zorgis nian politikan studon, altigon de nia kuracarto kaj ĉiutagan vivon. Mi faris malmulton por la popolo, sed la Partio kaj la popolo donis al mi grandan honoron. Mi estis elektita kiel popola reprezentanto al la Pekina Popola Kongreso kaj reprezentanto al la Kvara Tutlanda Popola Kongreso kaj estas vicestro de la revolucia komitato de la hospitalo. Mi havis la feliĉon esti plurfoje akceptita de Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ.”

### SUKCESA KURACO DE MULTAJ STRAN- GAJ MALFACILAJ MALSANOJ

En ĥirurgia praktikado de pli ol 60 jaroj Ĝaŭ Bingnan akumulis riĉan sperton de kuracarto, sed li ne estas konservativa. Li ne nur diligente studas la ĉinmedicinan teorion, sed ankaŭ pene lernas sciojn, ekzamenajn kaj kuracajn metodojn de moderna medicino, por senĉese altigi la nivelon de kuracarto. Kuracisto, kiu laboris multajn jarojn kune kun Ĝaŭ Bingnan, rakontis al ni pri la kuracado de Ĝaŭ Bingnan.


Li diris: “S-ro Ĝaŭ ofte diras, ke ‘sen interna kaŭzo ne efikas deekstera atako’. Li kuracas nur dermatologiajn kaj ĥirurgiajn malsanulojn. Li ne nur atentis la malsanan parton de pacientoj, sed ankaŭ atentis la farton de ilia tuta korpo. Krom la tradicia ĉinmedicina metodo ‘pririgardo de la malsanuloj, flaro de iliaj odoroj, pridemando al ili

kaj palpado de ilia pulso’, li ankaŭ atente aplikis analizojn de okcidenta medicino, ekzemple nombrovariadon de leŭkocitoj, rapidecon de sanga sedimentado, rutinan ekzamenon de urino k.a. Li estas tre pacienca al plendo de malsanuloj. Post detala esplorado de la aktuala stato li venis al ĝusta diagnozo. Dum kuracado, laŭ diversaj fenomenoj li donas malsamajn medikamentojn.”

Li rakontis kelkajn kazojn pritraktitajn de Ĝaŭ Bingnan. Iu kamparanino estis turmentata de defala dermatito tra la tuta korpo. Ŝi longe restis en febro. Diversaj antibiotikoj kaj tre valoraj drogoj ne efikis al ŝia malsano. Oni do turnis sin al D-ro Ĝaŭ Bingnan. Li detale pridemandis la malsanon kaj kuracmetodon kaj sciigis, ke ŝi eksuferis la malsanon post akuŝo. Li ŝanĝis la kutime uzatan recepton kaj preskribis al ŝi nutran kaj kontraŭfebran medikamentojn. Post dufoja preno de la medikamentoj ŝia temperaturo normaligis kaj poste ŝi iom post iom resaniĝis.

Iu kamparano de pekina antaŭurbo longe suferis de pleŭra tuberkulozo kaj okazis perforado en 9 lokoj. Post longa senefika kuracado li fine sin turnis al Ĝaŭ Bingnan por helpo. Ĝaŭ lin kuracis per tradicia metodo de la ĉina medicino metante en la aperturojn paperajn najlojn trempitajn en medikamento, kaj samtempe preskribis al la malsanulo ĉinmedicinan medikamenton karnokreskigan. Post ĉ. 4 monatoj la malsanulo jam povas partopreni en produktado.

*Ĝaŭ Bingnan (meze) kaj liaj asistantoj*



Dank' al kuna klopodo de D-ro Ĝaŭ Bingnan kaj okcidentmedicinaj kuracistoj, iuj malsanoj, rigardataj de iuj kiel "nekuraceblaj", estis moderegigitaj aŭ ĉesigitaj al malboniĝo. Dum kuracado Ĝaŭ Bingnan aplikas ankaŭ okcidentmedicinajn medikamentojn, ekzemple hormonojn, antibiotikojn k.a. Tiamaniere li povas atingi bonan efikon, kiun la ĉina aŭ okcidenta medicino sola ne povas doni.

### MEDICINA VERKO DE 300,000 ĈINAJ IDEOGRAFIAĴOJ

D-ro Ĝaŭ Bingnan diris: "En la malnova socio ĉinmedicinaj kuracistoj havis tre malaltan pozicion, kaj la ĥirurgoj estis eĉ pli malestimataj. Foje familianoj de iu malsanulo petis min diagnozi lin en hospitalo, sed tiam la hospitalo malpermesis ĉinmedicinajn kuracistojn ĝin eniri. Tial mi devis ŝajnigi min parencano de la malsanulo. Mi palpis al li la pulson nur kiam kuracistoj kaj flegistinoj forestis kaj la malsanulo devis ŝtele preni medikamenton de mia recepto. Post la Liberiĝo, mi ofte partoprenas en kolektiva diagnozo en la grandaj hospitaloj de Pekino kaj estas respektata de hospitalaj gvidantoj kaj medicinaj laborantoj kaj bonvena al malsanuloj."

Li montris al ni verdan binditan libron kun ora titolo sur la kovrilo "Klinika Sperto de Ĝaŭ Bingnan". La libro havas 300,000 ĉinajn ideografiaĵojn. Ĝi estas kompilita de Ĝaŭ Bingnan kaj liaj asistantoj sub la gvido de la partia komitato de la hospitalo.

D-ro Ĝaŭ Bingnan diris en emocio: "Miaj medicinaj scioj kaj sperto estas nur milionono de la tradicia medicino de la patrolando, sed estas tre respektataj, kio multe kuraĝigis min. Mi komprenas, ke redaktado de mia sperto ne celas mian personan famiĝon, sed disvolvon de la tradicia medicino de la patrolando. Mi decidis ne proprietiigi la sciojn kaj ne porti ilin en ĉerkon."

Komenciĝis la redaktado. Li prezentis ĉiujn materialojn kaj manuskriptojn akumulitajn en multaj jaroj kaj diris ĉion kion li scias. Ankaŭ liaj asistantoj prezentis siajn notlibrojn kaj disertaciojn al la redaktado de la libro. Ili atente

studis ĉiun drogon, ĉiun recepton, ĉiun paragrafon de eksplikado. Kun scienca sinteno ili resumis sperton sukcesan kaj malsukcesan, por ke oni ĉerpu el tio lecionojn.

Kun intereso ni foliumis la libron. Ĝi havas apartan stilon. La kazoj en la libro estas nomataj per nomo de okcidenta medicino kaj la stato de malsanoj estas eksplikita laŭ la postulo de okcidenta medicino. Post tio ili faris al tiuj kazoj ĉinmedicinan diagnozon kaj kuracmetodon. Post ĉiu kazo D-ro Ĝaŭ skribis atentigon kaj recepton. La libro konigas kelkajn apartajn kuracmetodojn, kiuj estas disvolvigitaj surbaze de sperto de antaŭuloj kaj estas provitaj en longa klinika praktiko. La libro enhavas ankaŭ liajn personajn receptojn kaj ofte uzatajn rutinajn receptojn.

La verko estis presita en 300,000 ekzempleroj kaj distribuata tra la tuta lando. La Pekina Ĉinmedicina Hospitalo ricevis multajn leterojn de legantoj de la libro, el kiuj iuj ĝoje sciigis, ke ili estas resanigitaj dank' al la receptoj entenataj en la libro, kaj aliaj konsultis kuracmetodon de aliaj malsanoj, kiujn la libro ne inkluzivas, kaj esperas, ke oni baldaŭ eldonu similajn librojn.

En la vizito ni informiĝis, ke la hospitalo jam asignis bonajn asistantojn al 18 ĉinmedicinaj kuracistoj kun la aĝo de pli ol 60 jaroj por elfosi la medicinan heredajon de la patrolando kaj lerni ilian sperton. Oni decidis plue eldoni aliajn ĉinmedicinajn verkojn de kvar famaj ginekologo, internomedicinisto, pediatro kaj ĥirurgo. Cetere oni preparas eldoni kelkajn sintezajn medicinajn librojn.

Ni adiaŭis D-ron Ĝaŭ Bingnan. Elirante ni vidis novan 10-etaĝan domon starantan norde de la hospitalo. Oni diris al ni: "Jen estas niaj novaj malsanulaj ĉambroj, kiujn ni baldaŭ ekuzos. En la domo instaligis 600 litoj kaj cetere dermatologia fako estos fondita."

Same kiel aliaj aferoj en nia lando, ankaŭ la medicina afero senĉese progresas. Certe efektiviĝos la granda idealo de Prezidanto Maŭ pri kreo de ĉina unueca medicino kaj farmakologio.



# La dramo

## “La Leviganta Suno”

de FANG VENĜI

**L**ASTATEMPE, laboristoj kaj oficistoj de Daking kaj iliaj familianoj prezentis en Pekino la sescenan dramon “La Leviganta Suno”, kaj ĝi gajnis laŭdojn de la spektatoroj.

### I

La dramo temas pri okazaĵo en la komenco de la ekspluatado de Daking-olekampo.

Post leviĝo de la kurteno prezentigas antaŭ la spektatoroj vasta stepo de norda Ĉinio, tra kiu galopas trajno kun longa fajfo. Inter la pasaĝeroj troviĝas du familianoj de junaj laboristoj. Unu el ili estas kamparanino Hin Juhong, kiu venas al Daking por konstrui la olekamon. La alia nomiĝas Lin Cajjing, kiu venas el urbo kaj havas malnovan penson “edziniĝi por vivi depende de sia edzo”. Ŝi esperas ke ŝi vivos komforte en Daking.

Veninte al Daking, Lin Cajjing vidis nur senliman stepon. Tie estas nek domo, nek pavimitaj stratoj kaj parkoj por promeni kune kun sia edzo. Ŝi estas tute en malespero kaj malkontenta pri ĉio. Kiam ŝia edzo Majstro Ĝaŭ admonas ŝin partopreni en kolektiva produkta laboro, ŝi kverelas kun li frapante tablon kaj ĵetante benkon. Kontraŭe Hin Juhong tute ne atendas, ke ŝia edzo Majstro Li instigas ŝin veni al Daking nur por ke ŝi faru hejmajn laborojn.

La patrino de Tiedan, kiu venis al Daking pli frue ol ili, estas mal-

laborema. Ŝi ofte kverelas kun aliaj kaj kreas malkonkordojn en alies familio. Tio multe ĉagrenas Vang, la estron de la familia administracio. Tiu ĉi opinias ke tiuj bagatelemaj virinoj estas postgintaj kaj estas malfeliĉe fari administradon pri ili.

Sekretario Luo de la putobora taĉmento ne tiel opinias. Li kritikas la eraran inklinon de Vang malestimi la virinojn, laŭdas kaj subtenas la familianojn kiuj partoprenas en agrikultura kolektiva produkta laboro kaj kontribuas sian forton por socialisma konstruado laŭ instrukcio de Prezidanto Maŭ ke la ĉina virinaro estas granda provizo de homa forto kaj oni devas elfosi tiun latentan forton. Por ŝanĝi la penson de la postgintaj virinoj, politika direktanto de la produkta taĉmento de familianoj

Guo Dejing kun profunda klasa amo organizas ilin por lerni koncernajn verkojn de Prezidanto Maŭ kaj edifas ilin per sia tragika travivaĵo en la malnova socio por altigi ilian klasan konscion. Sub ŝia gvido la familianoj komencis partopreni en agrikultura kolektiva produkta laboro kaj servaj laboroj de la minejo. Iom post iom ili komprenis, ke tio ne nur subtenas laboristojn multe bori putojn kaj multe produkti petrolon, sed ankaŭ estas revolucio kaj ĝusta vojo de revoluciigo, kolektivigo kaj laboruliĝo por la familianoj de la petrolkampo reformi la malnovajn morojn kaj kutimojn.

### II

La dramo enhavas klaran politikan penson kaj estas saturita de intensa vivetoso. Ĝi estis ludita

*En vagonaro al Daking, Hin Juhong, Lin Cajjing k. a. aŭskultas rakonton de Sekretario Luo de iu putobora brigado pri la malfacila konstruado de Daking en la komenca periodo.*







*Sekretario Luo kritikis la estron de la Familiana Administracio pro lia malestimo al virinoj.*

senartifike, nature kaj kortuŝe. Kial la amatoraj aktoroj povas atingi tian sukceson en arto?

Iun tagon ni venis al la loĝejo de la aktoroj kaj parolis kun ili pri tio.

Fan Gujlin, kiu ludas la rolon de la politika direktanto de la produkta taĉmento de familianoj Guo Dejing, diris: "La aferoj prezentitaj en la dramo estas persone viditaj, aŭditaj aŭ spertitaj de ni, kaj la lingvo en ĝi estas konata de ni. Oni prezentas ilin en la dramo nur pli koncentre kaj pli koncize."

Guste tiel, utiligante la artan formon de dramo Daking-aj laboristoj, oficistoj kaj iliaj familianoj reaperigis sian batalan vivon en arta scenejo. Inter la ludantoj de la dramo troviĝas putoboristoj, petrolkolektistoj, ŝargistoj kaj laboristaj fami-

lianoj, kiuj okupiĝas pri agrikultura produkto kaj servaj laboroj.

Kial ŝargisto Moŭ Jongĉang povas bone ludi gravan rolon de la administracia estro? Ĉar li spertis similan travivaĵon. En 1963, li laboris en la familia administracio. Komence li malestimis la virinojn, rigardis ilin kiel balaston kaj ne volis labori inter ili. Tamen faktoj edukis lin. La organizitaj virinoj altigis sian klasan konscion kaj komencis entrepreni agrikulturan kaj flankokupan produktadon kaj fondis manĝejojn, infanvartejojn kaj aliajn kolektivajn bonstatigajn servojn. Post unu jaro la virinoj jam ellernis administran teknikon, kaj Moŭ Jongĉang revenis al sia antaŭa produkta posteno. Tiam li tute ŝanĝis sian opinion pri virinoj kaj eĉ bedaŭris sian forlason de la administracio. Dank' al tiu persona sperto, Moŭ Jongĉang, kiu neniam rigardis longan dramon, povas relative bone kompreni la rolon kaj relative sukcese ĝin ludi.

La Daking-aj laboristoj kaj iliaj familianoj ankaŭ profunde kom-

*La familianoj esprimas sian firman decidon fari pli grandan kontribuon en konstruado de la nova olekampa regiono.*



prenis la gravecon de tio, ke la proletaro nepre devas okupi la literaturan kaj artan pozicion.

En la komenco de la sesdekaj jaroj, en ekspluatado de la olekampo la Daking-aj laboristoj jam entuziasme faris amasan artan aktivadon. Ili kreis kaj prezentis revoluciajn literaturajn kaj artajn programerojn apud oleputoj, en laborejoj kaj ĉe kamprandoj de la produktaj taĉmentoj de familianoj. Ili plenvoĉe kantis pri novaj homoj, novaj aferoj kaj novaj pensoj de la olekampo. Kiam la olekampo atingis novan sukceson en produktado kaj akiris riĉan rikolton en agrikultura kaj flankokupa produktado, la laboristoj, oficistoj kaj iliaj familianoj prezentis ilin per kuajban\*-o, gestokanto, poemo aŭ unuakta dramo.

De prezento de malgrandaj literaturaj kaj artaj programeroj al la ludo de grandtipa dramo "La Leviganta Suno" estis impeto de la Daking-aj laboristoj kaj iliaj familianoj en la socialisma literatura kaj arta revolucio. Ili rigardis la

ludadon de la dramo kiel revolucion por ke laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj okupu dramon scenejon. Ĉiufoje kiam ili provludis, multe da laboristoj venis por servi kiel senrekomenca reĝisoro por ili. Laboristoj helpis ilin revizii dialogojn kaj projekti dekoracion. Iuj el ili rakontis al la aktoroj pri veraj homoj kaj aferoj koncernantaj la rolojn de la dramo por helpi ilin kompreni kaj muldi heroojn. Huang Jupu ludanta la rolon de Majstro Li en la dramo estas putoboristo. En la komenco de la provludado li ĉiam ruĝiĝis de honto kaj timis ke li ne sukcesos en ludado. Ferulo Vang Ginhi tiris lin al si kaj kuraĝigis lin frapante lian ŝultron: "Ne timu. Ni putoboristoj povas teni bremsostangon de drilego kun pezeco de kelkdek tunoj, ĉu vi devas esti timigita de la ludado? Ankaŭ la paŝo de putoboro al prezento de dramo estas revolucio. Vi nepre devas ludi bone."

### III

"La Leviĝanta Suno" estas ruĝa floro en la socialisma literatura kaj arta ĝardeno de nia lando. Ĝi estis

verkita de Sun Vejŝi, kiu profundigis inter amasojn kaj spertis vivon en Daking en 1964, laŭ instrukcio de Ĉefministro Ĝou. En Daking Sun Vejŝi vidis ke la familianoj arde partoprenas en revolucio kaj fariĝis aktiva trupo en la konstruado de la minejo. Kortuŝite de tio ŝi decidis verki dramon por prikanti ilin. Por krei la dramon ŝi kore interparolis kun laboristaj familianoj de malsamaj travivaĵoj kaj amikiĝis kun ili. Ŝi sarkis herbojn kaj kolektis sojfabojn kune kun Onklino Hjue Gujfang, kiu siatempe kune kun aliaj kvar virinoj ekspluatit virgan teron per kvin fosiloj en la komenca konstrua periodo de la olekampo. Ŝi paŝtis bovojn sur la stepo kune kun Lu Gju kiu havas kromnomon "Pseŭda Knabo". Ŝi ĉiamaniere klopodis por fari tion kion la laboristaj familianoj povas fari kaj sperti kion ili spertis. Post unu jaro, ŝi finis la verkadon kaj petis Dakingajn gvidantojn, laboristojn kaj iliajn familianojn diskuti pri la verko por ĝin revizii. Iafoje ŝi piediris al nemulte klerigitaj virinoj je kelkdek kilometroj foraj por legi al ili la verkon kaj peti iliajn opiniojn.

Vintre de 1965, Daking-aj laboristoj, oficistoj kaj iliaj familianoj faris pli ol 200 prezentadojn de la dramo en Daking-olekampo, Pekino, Ŝandong-provinco kaj aliaj lokoj. Ĝiaj spektatoroj atingis pli ol 250,000 homojn. Ĉefministro Ĝou, Vicprezidanto Je kaj aliaj gvidantoj de CK de KPC rigardis ilian prezentadon kaj donis varman laŭdon.

Kun krimea celo forhaki la ruĝan flagon Daking, perfidulino Giang King kaj ŝiaj kunuloj longe malpermesis prezentadon de la dramo "La Leviĝanta Suno". Ili eĉ kruele persekutadis la verkinton de la dramo ĝis morto.

Nun, dek unu jaroj forpasis. Post faligo de la "kvarpersona bando", la dramo kvazaŭ la leviĝanta suno denove aperis antaŭ la vastaj amasoj.

*\* Kuajban-o estas unu el la multaj specoj de popolaj buŝaj artprezentadoj en Ĉinio. Ĝi konsistas el versoj deklamataj rapidritme laŭ la fortaj taktoj de klakilo el du bambuaj platoj.*

### Fruktoj de diligenta laboro





## Luktarto, ŝatata sporto de infanoj

**E**N frua mateno, oni povas vidi en la Pekina Kvara Infanĝardeno infanojn kelkope sin ekzercantajn en fundamentaj movoj de la ĉina luktarto. Guvernistinoj atente direktas ilin kaj la infanoj reciproke korektas la pozojn.


Tiuj infanoj tre ŝatas ĉinan luktarton. Multaj infanoj fariĝis fortaj dank' al ekzercado de luktarto. Ili malofte malsaniĝas je gripo k.s. Iliaj gepatroj tre ĝojas pro ilia sana kreskado.

Guvernistino diris al ni, ke ekde 1972 ili adaptis fundamentajn movojn de luktarto en gimnastikon kaj disvastigis ĝin inter infanoj, kaj la gimnastiko estas projektita konforme al diversaj aĝoj de la infanoj.

Li Taŭ tre ŝatas luktarton. Li progresas rapide kaj estas tre sprita en movado. Rapide li ellernis diversajn fundamentajn movojn kaj fariĝis luktarta sportisteto en la infanĝardeno. Kiam li estis forla-


sonta la infanĝardenon, li jam estis tre lerta en duopa lukto kun aŭ sen glavoj, ludado de lanco, kolektiva lukto kun glavoj, kaj fariĝis direktanto por infanoj de mezaj kaj unuaj klasoj. Nun li lernas en elementa lernejo kaj estas aktivulo de luktarto.

Luktarto estas ĉina tradicia sporto kun longa historio kaj aparta nacia stilo. Ĝi estas kultura heredaĵo kreita kaj senĉese riĉigata de la laboranta popolo. Por ataki kaj



*La Daĝaj-a Taĉmento de Geknabaj Luktartistoj en ekzercado*





*Infanoj de la Pekina Kvara Infanĝardeno ludas ringojn.*

sindefendi niaj praavoj iom post iom kreis la luktarton kun aŭ sen armiloj. Poste, tiu luktarto evoluis en unu el la sportaj ekzercoj, kiuj povas hardi homajn korpon kaj volon. Kaj cetere la movoj de luktarto enhavas belajn pozojn kaj tial ĝi estas ankaŭ prezenta arto. La batalaj dancmovoj en ĉinaj tradiciaj teatraĵoj kaj ĉinaj akrobataĵoj asimilis movojn de luktarto.

En la malnova Ĉinio la luktarto estis misterigita de la reakcia reganta klaso. Por sin vivteni, multaj infanoj devis lerni danĝerajn movojn, kiuj multe damaĝis la saron kaj iliaj korpoj misformiĝis. En la nova Ĉinio oni donas grandan atenton al hardiĝo de ĉiuj korpopartoj de infanoj en praktiko de luktarto.

En multaj elementaj lernejoj de la tuta Ĉinio troviĝas luktarta grupo, kiu aktivasi post la lecionaj horoj. Lernejoj sendas parton el la luktartaj amatoretoj en postkursan sportan lernejon, kaj tiuj povas helpi siajn kamaradojn post

reveno al sia lernejo. Multaj lernejoj regule donas lecionojn de luktarto. Ekzemple plejparto de la 800 mezaj kaj elementaj lernejoj de Pejĥian-gubernio de Giangsu-provinco donas lecionojn de luktarto. En la lastaj jaroj postkursaj sportaj lernejoj por geknaboj de la tuta lando fondis kurson de luktarto, per kiu oni elkulturis multajn sportistojn de luktarto. La fama produkta brigado Daĝaj de Sanĥi-provinco havas luktartan taĉmenton kun pli ol 30 membroj, el kiuj la plej aĝa estas 15-jara kaj la plej juna 8-jara. En la 4 jaroj post la fondiĝo de la taĉmento la membroj diligente hardis sin kaj jam ellernis diversajn luktartajn movseriojn kun aŭ sen armiloj, kaj multajn malfacilajn movojn. Ili faris pli ol 400 prezentadojn por fremdlandaj vizitantoj venintaj de pli ol 90 landoj kaj regionoj. En la pasinta jaro 8 geknaboj de la taĉmento vizitis fremdajn landojn kiel membroj de la Ĉina Luktarta Delegacio.

En Ĉinio luktarto fariĝis tre ŝata sporto de geknaboj.



# Nova

# Ŝoseo

**L**A Vad-Mdani-Gadaref-a Ŝoseo alinomata de la sudana popolo "Amikeca Ŝoseo" jam estas oficiale malfermita al trafiko. Ĉiutage, senfina fluo de aŭtoj trapasas la Vad-Mdani-an Pontegon super la Blua Nilo kaj rapide kuras sur la ŝoseo.

La nomata ŝoseo tra la ebenaĵo en la orienta parto de Sudano kun longeco de 227 kilometroj estis ŝultro-ĉe-ŝultre konstruita de laboristoj kaj teknikistoj de Ĉinio kaj Sudano laŭ la ekonomia kaj teknika kunlabora kontrakto inter la du landoj. Ĝia konstruado komenciĝis en marto de 1973 kaj finiĝis en marto de 1977.

La Vad-Mdani-a Pontego super la Blua Nilo longas 507.5 metrojn kaj larĝas 20 metrojn kun 8 spanoj kaj 9 pilieroj. Ĝiaj du ĉefaj spanoj longas po 120 metroj. Kaj ĝi estas la plej longa ŝoseponto de Sudano. La Blua Nilo estas profunda kaj fluas rapide. Por esti aktivaj en la konstruado de la pontego, oni devis fini la konstruadon de la bazoj de la tri ĉefaj pilieroj kaj konstrui iujn el la pilieroj ĝis super la

akvosurfaco de la rivero antaŭ la alveno de pluvoza sezono.

En majo, la temperaturo altis je 42° C. Malgraŭ la varmego, la laboristoj kaj teknikistoj de Ĉinio kaj Sudano laboris tage kaj nokte. Kiam ili sturme metis betonon al la 5-a piliero, la rivero subite ŝveliĝis kaj la supro de la pilieroj restis nur kelkdek centimetrojn super la akvo. Tiam la laboristoj kaj la teknikistoj unuanime altigis la ĉirkaŭajn digojn de la pilieroj en nokto kaj pene enverŝis betonon. La betonmiksa maŝino bruadis skuante la noktan aeron super la Blua Nilo. La laboristoj de la du landoj brave kaj obstine laboregis malgraŭ laciĝo kaj post la daŭra luktado de pli ol 20 horoj ili finfine venkis la riverŝveliĝon kaj altigis la 5-an pilieron super la akvosurfacon.

Miloj da sudanaj junuloj aliĝis al la laborvico tuj je la komenco de la konstruado. Plejparto de ili estis kamparanoj kaj paŝtistoj loĝantaj najbare de la ŝoselinio. Kvankam ili neniam uzis maŝinojn antaŭe, tamen ili firme decidis konstrui sian patrolandon kaj ŝanĝi la fizionomion de sia hejmloko kaj deziregis lerni teknikojn. Firme tenante la instruon de Prezidanto Maŭ kaj la instrukcion de Ĉefministro Ĝoŭ en la koro, la ĉinaj laboristoj kaj teknikistoj, plenaj de entuziasmo por subteni la sudanan popolon en disvolvo de ĝia nacia ekonomio kaj kulturado de ĝiaj konstruantoj, helpis la sudanajn fratojn ellerni teknikon. Jang Juanju, elektristo de la unua elektrolinia taĉmento, pene venkis la lingvan baron kaj instruis teknikon al sudanaj fratoj. Li lernis de sudanaj laboristoj la araban lingvon. Dank' al diligenta lernado li rapide ellernis arabajn vortojn kaj frazojn kaj povis rekte interparoli kun sudanaj laboristoj, kaj poste li eĉ povis doni lecionon pri tekniko sen helpo

de interpretisto. En praktika riparado li instruis al sudanaj laboristoj teknikon per munto kaj malmunto de maŝinpartoj. Poste, li petis sudanajn laboristojn imitadi kion li faris ĝis ellerno de la tekniko. Jang Juanju sola elkulturis 21 sudanajn elektrajn laboristojn. En la konstruejo, oni disvastigis la sperton de Jang Juanju, kaj pli vigle iris la instruado de teknikoj. Pro diligentaj lernado kaj praktikado, la sudanaj laboristoj progresis rapide. Ferstangeta preparisto Mohamed antaŭe ne scipovis la teknikon, tamen poste li fariĝis kapabla plenumi laŭ desegnaĵoj taskojn de ligado de ĉiaj ferstangetaj skeletoj. Li fariĝis ne nur elstara teknika laboristo, sed ankaŭ estro de la ferstangeta grupo de la konstruejo.

La sudanaj amikoj laŭdis, ke la pontokonstruejo estas lernejo por kulturado de teknikistoj. En la kvar jaroj, oni elkulturis ĉ. mil sudanajn teknikistojn kaj helpoteknikistojn en manipulado de bormaŝino, ĉarpentado, ligado de ferstangetoj, uzado de pumpilo kaj levmaŝino, maŝinriparado, elektroveldado ktp. En la fina periodo, preskaŭ ĉiuj maŝinoj estis manipulataj de sudanaj laboristoj, kaj la teknikaj grupestroj de ĉiuj laborspecoj estis senescepte sudanaj laboristoj.

La konstruado de la Vad-Mdani-a Pontego super la Blua Nilo bezonis 93,000 metrojn da tubo. Tamen, tiam tie estis nur unu ladaĵisto kaj unu gasveldisto, kun kvar aŭ kvin sudanaj junaj metilernantoj. Se ili farus tiajn tubojn nur per la manoj, ili ne povus plenumi la taskon en kelkaj jaroj. Post multfoja eksperimentado, ili elfaris tubomaŝinon, kiu 8-obligis la laborefikon, kaj krome la sudanaj metilernantoj ellernis gasveldadon. Fine, ili plenumis la taskon en malpli ol du jaroj.

La stirado, riparado kaj flegado de pli ol 20 rulpremiloj de diversaj

tipoj estis plenumitaj de sudanaj laboristoj elkulturitaj en laborado.

Kun la disvolviĝo de la ŝosekonstruado, la difektitaj maŝinoj pli kaj pli multiĝis pro longtempa uzado. La sudanaj riparistoj elkulturitaj en praktiko ludis gravan rolon en tio. La ĉinaj kaj sudanaj laboristoj bone kunlaboris sub la devizoj "riparetoj ne devas esti prokrastitaj ĝis la sekvanta tago", "preferu malmulte ripozi ol paneigi la maŝinojn". Kaj krome ili praktikis la sistemon de perioda flegado por preventi funkciiĝon de maŝino kun difekto. Ili ankaŭ meminciate iris al la staplejoj kaj konstruejoj por ekzameni kaj ripari maŝinojn kaj aŭtojn. Pro la kuna klopodado de la riparistoj de la du landoj, ĉirkaŭ 80% de la maŝinoj ĉiam restas bonaj. Tio multe kontribuis al glata plenumo de la konstruado.

Ankaŭ la sudanaj popolamasoj aktive subtenis la ŝosekonstruadon. La provizado de gruzo estis ŝlosila problemo en la konstruado. Kun la etendo de la konstruita ŝosebazo, pli kaj pli longiĝis la transporta vojo kaj multiĝis la difektitaj veturiloj, tial la trafikaj problemoj pli kaj pli akriĝis. Tiam, loĝantoj en najbareco de la ŝoselinio, meminciate helpis la konstruantojn trovi 26 proksimajn gruzejojn malgraŭ varmego kaj longa irado. Tio garantiis glatan disvolviĝon de la konstruado kaj malaltigis la konstruan koston.

Post la finiĝo de la konstruado, plejparto de la sudanaj laboristoj krom malmultaj el ili restantaj por flegi la ŝoseon, iris al novaj konstruejoj. Nemalmultaj sudanaj teknikaj laboristoj elkulturitaj en tiu konstruado ludis rolon de teknika spino en novaj konstruaj aferoj. La amikeco inter la ĉina kaj sudana popoloj formita en la konstruado de la ŝoseo kaj la pontego ĉiam fluados kiel Nilo.



# “Subteraj arbaroj”

de FAN LI KAJ HA SI

ĈIRKAŬ la jaro 1950, ĉina arbarestro venis en montaron en la orienta parto de Hejlonggiang-provinco kaj komencis esploron al tiaj praarbaroj. Kiam ĝiaj membroj iris en la profundan montregionon altan je 900-1000 metroj super la marnivelo, ili vidis antaŭ si strangan pejzaĝon: en iuj lokoj praarbaroj kreskas en profundaj kavoj. La arbaroj montrigis kvazaŭ ili estus kreskantaj subtere, tial oni nomas ilin “subteraj arbaroj”.

En 1958, tiu esplora taĉmento refoje venis tien. Krom esploro pri la arbara riĉfonto ili ankaŭ multe fotografis. En la pasintaj pli ol dudek jaroj oni havis multajn konjektojn pri la “subteraj arbaroj”, ĉar estis tre malfacile eniri ilin kaj tre malmultaj homoj sciis ilian detalan staton.

En la lastaj jaroj, kun disvolviĝo de la socialisma konstruado ŝoseo etendiĝis proksimen al la “subteraj arbaroj”. Antaŭ nelonge, ni kiel membroj de esplora taĉmento refoje venis al kaj faris unuapaŝan esploron pri ili.

En varmega somero, ni veturis per aŭto trans la ponton super Mudan-rivero sur vastan altebenedon el magma roko. Antaŭ ni prezentiĝis mirindaĵo formita de fluanta bazalto simila al boao; ĉie troviĝis lafo-kavoj profundaj kaj malprofundaj. Tio montris, ke en tiu zono erupciis vulkanoj antaŭ ne tre longe.

Iom post iom nia aŭto venis en arbaron. La ŝoseo fariĝis pli kaj pli mallarĝa, ĉe ĝiaj ambaŭ flankoj ondas montaro kaj ĉielskrapas pinglaj kaj larĝfoliaj arboj. Malproksime, jen kaj jen vidiĝis aproj kaj cervoj. Pli antaŭe estis ĉielskrapa larika arbaro. Pro tio ke la grundotavolo sur la bazalto estas maldika, iuj arboj falis pro vento kaj kuŝis tere. Nelonge poste, nia aŭto haltis antaŭ ligna kabano ĉe la fino de la ŝoseo.

Maljuna forstokulturisto kun aĝo de pli ol 60 jaroj bonvenigis nin kaj poste gvidis nin al la “subteraj arbaroj” por esplorado. Kvankam li estis maljuna, tamen li ascendis monton rapide. Ni jen iris sur grundotavolo de putraj branĉoj kaj folioj mola kiel lana tapiŝo, jen saltis trans arbotrunkojn kiel sportistoj, jen eniris en arbetaron. Ni levis la kapon, sed ne povis vidi la ĉielon. Ĉio estis en silento. Ni aŭdis bruon kvazaŭ de akvofalo. La maljunulo diris ke tio estas susuro de la arbaro, kaj nur tiam ni komprenis la veran signifon de “muĝo de arbaro” en literaturo.

Post unuhora irado, subite aperis antaŭ ni sur la malakuta deklivo granda kavo kaj ni alvenis al la rando de “subtera arbaro”. Montrante la arbaron malsupre en la kavo, la maljunulo diris al ni, ke ĝi estas unu el la relative grandaj “subteraj arbaroj”. Ni ĉirkaŭrigardis la subteran arbaron en la kavego simila al kaldronego — antaŭe tie

estis kratero. Tuj apude en la nord-oriento troviĝas alia enkratera arbaro.

Por forpeli la sovaĝajn bestojn ni unue pafis, kaj poste glitis pendante sur ŝnuro malsupren al la fundo de la kratero. Niaj vokoj en kaj ekster la kratero eĥadis en la valo kaj arbaro kaj longe resonadis.

En ĉiu kratero kreskas aensa praarbaro ĉefe el pinglaj arboj kiel

*Membroj de la esplora grupo en laboro*





ruĝa pino (*Pinus koraiensis*), malbonodora pino (*Abies nephrolepis*) kaj skvama pino (*Picea microsperma*), kaj altaj larĝfoliaj arboj kiel *huangboluo* (*Thellodendron amurense*), frakseno, monta juglandarbo (*Juglans mandshurica*), tilio, monta poplo (*Populus tremula*) kaj mongola kverko (*Quercus serrata*), kaj estas ankaŭ arbustaroj de rododendroj. La pinglaj kaj larĝfoliaj arboj estas altaj, el kiuj iuj atingas la altecon de 40 metroj kaj multaj arboj aĝas je 400-500 jaroj. La trunko de iuj arbospecoj estas longa, rekta kaj sentubera kun abunda rezino. Ili estas bona materialo por konstruado kaj farado de vagonoj kaj ŝipoj. Kaj la ligno de iuj arbospecoj estas solida, elasta kaj malfragila kaj taŭgas por fari instrumentojn. Inter gigantaj arboj kaj la malaltaj arbustoj troviĝas volvtigaj vegetaĵoj — ampelopsoj (*Vitis amurensis*), kiuj grimpas sur la trunkoj kaj branĉoj de diversaj arboj. Kaj multaj specoj de grimpaj vegetaĵoj kreskas sur arboj, ekzemple aroma skisandro (*Schisandra*), jujuba aktinidio

(*Actinidia kolomikta*) k.a. Sur ploj, salikoj, ulmoj k. a. kreskas visko ilekso (*Ilex pedunculosa*), kiu povas esti uzata kiel drogo. Troviĝas usneo, alia speco de parazita vegetaĵo, kiu pendas sur arbobranĉoj per grizbrunaj ĉiroj kaj estas tre bela.

Pro manko de sunlumo, en la fundo de la kratero estas mallume, humide kaj malvarme. Kvankam tiam estis somero, tamen la fundo de la kratero ankoraŭ estis kovrita de glacio. Tie la meznombra temperaturo estas ĉ. 4° C kaj la jara kvanto de precipitaĵo estas 600-800 mm. La grundo el eflorskinta vulkana cindro estas tre fekunda, kaj aldoniĝis al ĝi fekaĵoj de multaj animaloj kiel sterko, tiel ke formiĝis bonegaj kondiĉoj por la kreskado de la "subteraj arbaroj".

La densaj "subteraj arbaroj" estas oportunaj lokoj por vivado kaj generado de diversaj animaloj. Ni vidis sur muro de la kratero dikan tavolon da kapra fekaĵo kaj ankaŭ freŝan fekaĵon de ĉeval-cervo (*Cer-*

*vus elaphus*) kaj urso. Ĉe tiu loko ni aŭdis paŝbruoŝojn kaj gruntoŝojn de forkurantaj aproj kaj ankaŭ vidis piedsignojn de ibekso, ĉeval-cervo, urso, tigro de nordorienta Ĉinio k.a. bestoj. Sciuroj saltis de branĉo al branĉo. Tiam la maljuna forstokulturisto diris al ni ke en rok fendoj kaŝiĝas serpentejoj.

Kiam ni suriris pli altan monton, ni vidis 7 gigantajn kraterojn en vico de nordoriento al sudokcidento en tereno longa je pli ol 20 kilometroj kaj alta je 750-1000 metroj super la marnivelo. La densaj arbaroj en la kavegoj kuniĝis kun tiuj sur la montodeklivo tiel ke, ili formis senliman verdan maron. En la pli ol 800 krateroj trovitaj de nia lando, tiaj densaj arbaroj estas tre raraj. La aktivado de tiuj ĉi vulkanoj en la pasinteco kaj la hodiaŭaj "subteraj arbaroj" havas certan valoron en studo de geologio, geomorfologio, vegetaĵoj kaj sovaĝaj animaloj. La riĉaj fontoj de vegetaĵoj kaj animaloj de tiu loko estos utiligataj.



## La fontakvujo de Tangbian-vilaĝo


de MING GUANG

**E**N la historio de la ĉina revolucio, Jonghin-gubernio de Gingsangsan-subprovinco de Gianghi-provinco havas sian brilan paĝon. En sia brila verko «La Batalo en Gingsangsan», la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong diras: "Dediĉi grandan forton al la disvolviĝo de Jonghin, krei tie sendependan reĝimon de la amasoj kaj prepariĝi por longdaŭra batalado."


Jonghin-gubernio nun ankoraŭ konservas multe da revoluciaj objektoj kaj historiaj lokoj. Unu el ili estas la puto Fontakvujo de Tangbian-vilaĝo.

En junio de 1928, la Ruĝa Armeo triafoje okupis la gubernian urbon de Jonghin, post kiam la armeo komandata de Prezidanto Maŭ venkis la du diviziojn de Jang Ĉiseng kaj Jang Juhjuan de la Kuomintanga

reakcia armeo ĉe Longjuankou en Gianghi-provinco. Nelonge poste Prezidanto Maŭ kondukis la 3-an batalionon de la 31-a regimento de la Kvara-fronta Armeo de la Ruĝa Armeo al Tangbian-vilaĝo de Jonghin-gubernio. Ekde tiam, arde disvolviĝis la amasa revolucia movado renversi la regadon de la lokaj tiranoj kaj distribui iliajn agroj al malriĉuloj en la lokoj kun Tangbian-vilaĝo kiel la centro.



*Domo iam loĝita de Kamarado Maŭ Zedong*



*La Fontakvujo*

Observante la instrukcion de Prezidanto Maŭ **“antaŭenpuŝi la disvolvon de la lokaj partiaj organizoj per la helpo de la armeaj partiaj organizoj kaj antaŭenpuŝi la disvolvon de la lokaj armitaj fortoj per la helpo de la regula armeo”**, armitaj propagandaj taĉmentoj konsistantaj el komandantoj kaj soldatoj de la Ruĝa Armeo venis al Tangbian kaj aliaj ĉirkaŭaj vilaĝoj por fari detalan esplorado kaj enketado pri la loĝantaro, familioj, procento de agroposedanteco, grandeco de la fortoj de la klasoj, revoluciaj organizoj kaj la stato de lokaj tiranoj kaj malbonaj sinjoroj. Ĉie kien la Ruĝa Armeo iris, ĝi vizitis malriĉajn kamparanojn, disvolvis organizojn de la Partio, establis lokajn armitajn fortojn kaj semis revoluciajn fajrerojn.

Iun antaŭtagmezon en somero de 1928, la suno brilis. Starante sur la podio provizore starigita sur la vasta grensunumejo post Tangbian-vilaĝo, Prezidanto Maŭ analizis alcentoj da revoluciaj kamparanoj la

klasan staton de la vilaĝo, montris, ke la kaŭzo de la suferoj de la malriĉuloj estas **“la tri grandaj montoj”** — imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapitalismo pezantaj sur la popolo, alvokis, ke la suferantaj laborantaj amasoj rapide sin organizu, disvolvu sian revolucion forton, renversu la regadon de la lokaj tiranoj kaj distribu iliajn agrojn al la malriĉuloj kaj marŝu antaŭen kuraĝe kaj venke.

**Ekbolis Tangbian-vilaĝo!**

En tiu tempo la partia komitato de Jonghin-gubernio kaj la gubernia registaro de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj ankaŭ translokiĝis al Tangbian-vilaĝo. Sub helpado de la Ruĝa Armeo, rapide fondiĝis diversaj revoluciaj organizoj, kiel la speciala partia filio de Tangbian-vilaĝo, la Tangbian-vilaĝa ribela trupo, la virina asocio kaj la infana gvardio.

Post sia stariĝo, la ruĝa reĝimo kaj la loka armita forto tuj disvolvis potencon movadon por renversi

la regadon de lokaj tiranoj kaj distribui iliajn agrojn al la malriĉuloj. La Tangbian-a popolo kondamnis al morto la grandan lokan tiranon kiu okupis grandan areon da agroj kaj montoj kaj faris ĉiajn malbonojn al la popolo; ili forigis la limŝtonojn de la feŭdaj bienuloj, bruligis la hommanĝajn atestojn pri terluado kaj ŝuldoj kaj distribuis agrojn al la malriĉuloj. La agroj, kiujn la malriĉuloj longtempe deziris akiri eĉ en sonĝo, finfine revenis en iliajn manojn. Kiel ĝojis la multe suferintaj kamparanoj.

En Tangbian-vilaĝo, Prezidanto Maŭ loĝis en la hejmo de malriĉa kamparano Onklino Ĝoŭ. En la simpla kabano Prezidanto Maŭ ofte interkonsiliĝis kun kamaradoj de la armeo kaj la lokaj partiaj organizoj pri laboro kaj faris projekton de la agrara revolucio.

La montetoj post Tangbian-vilaĝo estis plenaj je arbustoj kaj herboj. Prezidanto Maŭ kaj la registaro de Tangbian-vilaĝo kune planis utiligi ilin. Observante la instrukcion de

Prezidanto Maŭ la Tangbian-a popolo utiligis la montojn kaj plantis sur ili multe da oleaj kamelioj por kovri la mankon de manĝoleo al la amasoj. Poste, kvankam reaktiuloj kelkfoje bruligis la montojn, tamen la tieaj amasoj ĉiam denove plantis tiajn arbojn sur ili. Nun la montoj jam estas dense kovrataj de oleaj kamelioj.

En la distanco de 250 metroj okcidente de Tangbian-vilaĝo troviĝas

malgranda montodeklivo. Apud kelkaj grandaj ŝtonoj sub ĝi estas puto, kiu famiĝas tra la loko per la nomo "Fontakvujo". Tiam, ĉirkaŭ la puto kreskis sovaĝaj herboj kaj kuŝis ŝtonoj malorde. Kiam falis pluvo, la torento tuj malklarigis ĝian akvon. Vidinte tion, Prezidanto Maŭ larĝigis kaj profundigis la puton al ĝi kun ruĝarmeanoj sub sia gvido. Depost tiam la putakvo ĉiam estas pura kaj klara.

Aŭtune de 1928, kiam grenplantoj maturiĝis, la liberigitaj kamparanoj de Tangbian-vilaĝo kaj ruĝarmeanoj komencis fari la unuan rikoltadon post la agrara revolucio. Tiam Prezidanto Maŭ laboris kune kun kamparanoj kaj soldatoj. Dum laborado Prezidanto Maŭ intime interparolis kun kamparanoj por altigi ilian klasan konscion, por ke ili pluapase komprenu la veron pri batalo por liberigo kaj ĝisfunda konduko de la revolucio.



FOSILIA BIRDO

Lastatempe kompleta fosilia birdo estas unuafoje trovita en Ŝandong-provinco de nia lando. Ĝi havas gravan scienca valoron por studi paleogeografion kaj paleometeologion.

La fosilio estis konservata en fundo de lago. Sur ĝi klare videblas signoj de kapo, beko, kolo, flugiloj, trunko, kruroj kaj piedoj. Arkeologia fako ekspertizis, ke la fosilia birdo apartenas al la familio de fazanedoj el la ordo de galinoformaj birdoj.

Birdoj malfacile fosiliĝas pro tio, ke iliaj ostoj estas maldikaj kaj delikataj kaj ĝia vivmedio estas neordinara. Inter la kvin vertebrularoj de fiŝo, amfibio, reptilio,

birdo kaj mamulo, birdo plej malofte formis fosilion, tial la fosilio estas tre rara.

#### X-RADIA APARATO POR DIAGNOZI MAMAN KANCERON

Speciala X-radia aparato kun avangarda nivelo, por diagnozi maman kanceron, estas fabrikita en Ŝanhajo. Iu hospitalo de Ŝanhajo faris klinikan filmadon al 1,500 pacientoj, kaj la distinga povo de la aparato pri tumoroj atingis 97%. Per ĝi oni povas trovi maman kanceron de frua periodo, kio forte progresigas la ĝeneralan ekzamenon pri kancero en nia lando.

Tiu novtipa aparato ankaŭ povas esplori internan kreskadon de vegetaĵoj kaj trovi tre malgrandajn fendon kaj difekton interne de metala kaj nemetala objektoj. Ĝi povas ludi rolon, kiun ne povas ludi ordinara X-radia difektoserĉa aparato, kaj povas esti vaste uzata ankaŭ en la scienca kaj arkeologia esplorado.

#### TEKSMAŜINO POR LARĜA EKRANA ŜTOFO

La unua teksmaŝino por larĝa ekrana ŝtofo de nia lando naskiĝis

en la Vuhi-a Litkovrila Fabriko. Tiu maŝino estas simpla en strukturo kaj oportuna en manipulado. Ĝia kosto estas nur dekkvino de samspeca importita maŝino. La unupeca larĝa ekrana ŝtofo produktita de ĝi karakteriziĝas per taŭga heleco, granda klareco kaj bona efikeco por projekciado.


#### IDEALA HERBO POR EKSTRAKTI HORMONON

Sciencaj laborantoj de nia lando trovis idealan vegetaĵon nomatan rosoherbo (*Cyanotis arachnoidea*) por ekstrakti insekto-senŝeligan hormonon, kiu povas kreskigi insektojn. Per tio ili faris kontribuon en disvolvado de nia bredado de silkraŭpoj.

La menciita hormono estas mikrokvanta kemia materio interne de insekto. Ĝi ludas gravan rolon en kreskado de insektoj kaj ankaŭ povas esti uzata por mortigi fiinsektojn. Nia lando jam akiris fundamentan sukceson en uzado de tia hormono por bredi silkraŭpojn.

Rosoherbo entenas multan insekto-senŝeligan hormonon, vivas facile kaj estas en abundeco.






La Suno Leviñas de Saúsan



Gingang-montaro





La Kunvenejo de Zunji-konferenco kun Flirtanta Ruĝa Flago





Grasaj Brutaroj sur Vasta Stepo



Aromas Petrolo ĉe Vuki-urbeto



近江寶塔慶勝利  
元七年夏  
陳維新畫  
其洋海全化

La Jan-an-a Pagodo en  
la Celebrado de Venko



02850

